

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

POPOLA
FORUMO

•

ZAMENHOF
KAJ
LITOVIO

•

BRILA
POETO

•

DIMITAR
ZLATARSKI
85 – JARA

•

DISTROJ



JARO 57 • N-RO 4 • APRILO • 88



Faro kaj sorto de la laboruloj

(Fragmentoj el la raporto de Todor Jivkov, Ĝenerala Sekretario de Bulgara Komunista Partio kaj Prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario antaŭ la Nacia Partia Konferenco, okazinta la 28-an kaj 29-an de januaro 1988)

● Ni bone konscias, ke por plua efektivigo de la rekonstruado nin atendas grandega laboro. Laboro por la evoluigo kaj de nia koepto, kaj de niaj praktikaj metodoj, kaj de la kompleta tuteco de materialaj faktoroj, publikaj interrilatoj kaj spiritaĵaj procesoj formantaj nian socian realaĵon. Nia ĉefa, decida punkto — apogo en la renovigo — tio estas la popolo kaj la partio, la partio kaj la popolo.

● Nun, kiam ni eniras la esencon de la renovigo, antaŭ ni plenkulture ekstaras la ĉefa tasko: la spirito, la patoso, la senco de la renovigo penetru vaste inter la milionoj da homoj, estu komprenitaj kaj praktike aplikataj en la agado de la milionoj da homoj.

● En la proceso de la renovigo ni kreas vicon da objektivaj kondiĉoj, kiuj helpadas kaj ne povas ne helpadi tiun proceson. Ni bone konscias, ke nun la homoj komencas vivi kaj labori en tute nova situacio.

Tiu problemoj koncernas ne nur la socialisman vivmanieron; ĝi koncernas ĉiujn senescepte aspektojn de la homa ekzistado kaj evoluo.

Ni traktas la homon kiel tutecon el la sociaj interrilatoj. El tiu vidpunkto:

- nova estas la ekonomia pozicio el la homo;
- nova estas la sociala pozicio de la homo;
- nova estas la politika pozicio de la homo;
- nova estas la ideologia pozicio de la homo.

Ĝenerale, en la kondiĉoj de la memregado estas garantiataj novaj mekanismoj por formado kaj realigado de la personeco.

● Ĉu estos malfacilaĵoj tiurilate? Jes, certe, ĉar temas pri fundamentaj ŝanĝoj en la konscio de la homoj, inkluzive en la konscion de la kadruoj kaj de la komunistoj. Estas nepre necese, ke la homa faktoro ekfunkciu, ke la tuta popolo aktive partoprenu la proceson de la renovigo.

● Alivorte, la tasko estas, ke la fundaj ŝanĝoj, kiujn ni deziras realigi kaj ni nepre realigos, fariĝu plej grava celo, sorto de ĉiuj laboruloj en nia socio.

Kiuj estas la decidaj alpaŝoj, la maniero por realigo de tiu tasko?

— Unue, tio estas transformigo de la laborkolektivoj kaj la teritoriaj komunumoj en mastrojn de la socialisma propraĵo kaj en subjektojn de ĝia regado.

— Due, tio estas la ekonomiaj reguligantoj. Ili estas, figure dirite, la kvintesenca por la renovigo de ĉiu membro de la socio, ili difinas en plej alta grado ankaŭ la rilaton de la milionoj da homoj al la renovigo de la tuta socio.

— Trie, tio estas la interesoj de la milionoj da homoj, la interesoj de ĉiu persono en ĉiu sociala komunaro.

Ĉiu el ni devas bonege kompreni kaj konsciiĝi pri io ege grava: se ni ne „kaptos“ la interesojn de la aparta laborulo, specialisto, gvidanto, de la aparta laborkolektivo, de la aparta sociala grupo, de la loĝantaro, ni ne povos direkti kaj inspiri la volon de la milionoj da homoj, gajni ĉiun por la renovigo.

● Nun, kiam ni faras tiun ĉi bilancon, al ĉiu devas esti tute klare, ke ni troviĝas en la komenco mem de la rekonstruado, de la laboro kaj la batalo por realigo de la partia koncepto pri plua konstruado de la socialismo en Popola Respubliko Bulgario.

Antaŭ ni estas longa kaj komplika vojo de revoluciaj ŝanĝoj en ĉiuj sferoj de la socia vivo, kiuj alkondukos la socialismon en nia lando al pli alta etapo de evoluo.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 57

APRILIO

4 • 1988

POPOLA FORUMO

Koncize pri la Nacia Partia Konferenco
(28, 29. I. 1988, Sofio)

Gin partoprenis 3200 delegitoj—reprezentantoj de 958 000 bulgaraj komunistoj, kaj 470 gastoj — membroj de la Bulgara Agrara Popola Unuiĝo, de la Patrolanda Fronto kaj senpartiuoj. Por informi pri la Konferenco, en Sofio estis senditaj 130 eksterlandaj ĵurnalistoj. La mondaĵ rimedoj por amasinformado donis vastan lokon al tiu grava evento en la socia vivo de Bulgario.

MOSKVO: En siaj informoj la sovetaj korespondantoj substrekas la ĉefpenson en la raporto de la Generala Sekretario de BKP Todor Jivkov „La renovigo — faro de la partio, faro de la popolo“. Dum la konferencaĵ tagoj en Sovetunio, oni parolis ankaŭ pri la emfazita en la raporto neceso pri enkonduko de mandata sistemo t. e. estonte la partiajn gvidantojn oni elektos nur por du aŭ tri mandatoj.

BEOGRADO: La zagreba revuo „Danas“ komentariis, ke inter la multaj reformoj estas ankaŭ ŝanĝoj en la balota leĝo kaj la pli grandaj rajtoj ĉe la memregado de la laborkolektivoj.

PEKINO: Agentejo „Sinĥua“ citis la vortojn de T. Jivkov, ke Bulgario plu disvolvos kaj pliriĉigos la sistemon de la socialisma propretaĵo: ŝtata, kolektiva, komunuma, individua.

BONNO: Ĵurnalo „Suddeutsche Zeitung“ substrekis, ke dum la Konferenco estis donitaj konkretaj direktivoj por renovigo en la soci-ekonomia evoluo de la lando.

VASINGTONO: „The New York Times“ publikigis korespondanĵon de sia sendito kaj foton de la Generala Sekretario de BKP.

PARIZO: J. „Monde“ skribis pri tiuj partoj el la raporto, en kiuj estas traktataj la novaj funkcioj de la partio kaj la ŝtato en la proceso de renovigo.

LONDONO: J. „The Times“ substrekis la vortojn de T. Jivkov, ke la renovigo en Bulgario estus nebla sen la ŝanĝoj en USSR.

TOKIO: J. „Asahi“ notis, ke en Bulgario oni faras profundajn reformojn, kies bazo estas la disvolviganta memregado.

Por ke oni komprenu la laboron de la Nacia Partia Konferenco, oni devas rememori la decidojn de la Julia kaj Novembra Plenkunsidoj de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio (1987). La unua donis teoriantan modelon por la plua konstruado de la socialismo en Bulgario, kun perspektivo al la 21-a jarcento. La dua konkretigis la metodojn kaj agmanierojn por realigo de tiu modelo.

La Konferenco estis ne nur evento por la Bulgara Komunista Partio, sed ankaŭ forumo de la tuta bulgara popolo. Ĝi estis rekte observata de ĉiuj per la televido kaj vaste respegulata ankaŭ de la ceteraj amaskomunikiloj. Dank' al tiu publikeco ĝi atingis ĝis ĉiu familio kaj homo. Ĝi montris la konkretajn vojojn por renovigo de la socia vivo, por plua demokratiigo

survoje al la memregado. La komenciĝinta renovigo ampleksas ĉiujn sociajn sferojn. Antaŭstaras plenkunsido de CK de BKP, dediĉita al la spirita vivo.


Nun, en la novaj kondiĉoj, nature estas ankaŭ homoj, kiuj ne bone komprenas la renovigon. Ĉiu homo akceptas ĝin laŭ siaj ĝenerala kulturo, personaj intereso kaj ofica posteno. La statistiko montras, ke la bulgaroj konscias la neceson de renovigo kaj la pliparto el ili akceptis la renovigan proceson kiel sian propran faron, kiel vojon al ankoraŭ pli alta evoluo de nia lando.

En siaj eldiroj la delegitoj de la Konferenco kritike kaj memkritike pridiskutis vicon da problemoj kaj ankaŭ montris la manierojn por ilia solvo. Tre aktualaj kaj gravaj estis la eldiroj de la reprezentantoj el la ekonomia sfero. Ili parolis pri la kialoj de la nesufiĉe bona nivelo de iuj produktaĵoj, pri la organizado de la labortempo, pri la ligoj inter gvidantoj kaj gvida-

toj, pri la rilatoj inter la vilaĝo kaj la urbo kiel sociaj komunaj ktp. La reprezentantoj de la bulgara intelektularo substreki la neceson de renovigo ankaŭ en la spirita sfero. Laŭ ili, pli ofte iliaj kolegoj devas esti inter la homoj, al kiuj estas direktitaj la kulturaj atingoj. Tiel la kreantoj pli bone kaptus la „guston“ de la nuntempo kaj pli ofte „prenus“ siajn heroojn el la vivo mem. La intelektuloj parolis ankaŭ pri pli intensa interŝanĝo de kulturaj valoroj inter Bulgario kaj aliaj landoj.

Sian lokon en la renoviga proceso havas ankaŭ Bulgara Esperantista Asocio. Kiel sociokultura organizo ĝi povas multe kontribui por pli vigla komunikado inter la esperantistoj el diversaj landoj. Por ke la popoloj ekkonu pli bone unu la alian, por ke la monda paco konservigu ankaŭ helpe de Esperanto. Por ke homoj el malsamaj popoloj ne interŝangu kuglojn kaj bombojn, sed materialajn kaj spiritajn valorojn.

Zamenhof kaj Litovio



„Proksime, trans Polujo, kuŝis tiu lando, kie naskiĝis esperantismo“ (E. Privat. „Vivo de Zamenhof“ Londono, 1937, 111p.).

Pri estado de L. Zamenhof en Litovio aperis pluraj publikigaĵoj kaj notoj. A. Dambraskas-Jakŝtas verkis elĉerpan biografian skizon pri L. Zamenhof („Uzgeŝe žiburliai“, Kaunas, 1930, p. 443—448). En la ĉapitro „Zamenhof en Litovio“ li skribas i. a., ke Zamenhof naskiĝis en klera familio en Bialystok. En 1885, post diplomigo, li komencis labori kiel kuracisto en la litova urbo Veisiejai (Vejsėjai). Tie li pretigis por publikigo la vortaron kaj gramatikon de internacia lingvo. Li konsumadis onidire po 3 funtojn da kandeloj dumsemajne; dumtage li ja estis tre okupita pri pacientoj. Lokaj loĝantoj ankoraŭ nun (t. e. dum verkado de la biografio) rememoras la bonkoran brunbarban kuraciston, sed ili ne antaŭsciis, ke li famiĝos tra la tuta mondo ne kiel kuracisto.

La elstara esperantisto de nia respubliko A. Poška en 1925 en

Veisiejai enketis la plej aĝajn lokajn loĝantojn. Laŭ liaj notoj, publikigitaj en la revuo „Litova Stelo“ (1937, nr. 4), malkovrigas karakteraj trajtoj de la personeco de Zamenhof. D-ro L. Zamenhof en Veisiejai manifestiĝis ne nur kiel kompetenta kuracisto, sed ankaŭ kiel noblanima homo. Foje dum revojaĝo hejmen Zamenhof atentis survoje iun patrino, kies infano grave malsanis. La infanon sufoke turmentis tuso. Loka ĉarlatano Kuklianskis fuŝkurace kaŭzis toksigon al la infano. Dum ĉirkaŭ tri horoj d-ro Zamenhof laboris kaj forigis la dangeron. Por la kurachelpo li ne prenis pagon, male — al la malriĉa patrino li donis unu rublon por aĉeti medikamenton. Post ĉi tiu evento ĉiuj parolis pri la kuracisto kun granda simpatio. Dum Zamenhof loĝis en Veisiejai, foje ĉe unu kamparano okazis incendio, brulvundiĝis infanoj, kiujn kuraci estis alvokita d-ro Zamenhof. Post la medicina esploro de la malsanuloj, al la suferinta familio Zamenhof fordonis la tutan monon, kiun li havis, kaj por reveno hejmen li mem devis pruntepreni de aliaj. Printempe de 1887 Zamenhof vojaĝis el Kaunas. Survoje la ĉevalo de la fiakristo malfortiĝis kaj mortfalis. Al la fiakristo Zamenhof donis 50 rublojn por aĉeti alian ĉevalon, ĉar ĉevalo estis ja sola fonto de ekzisto por la fiakristo.

Mi aŭdis de lokaj maljunuloj, ke Zamenhof ne scipovis bone la lito-

van lingvon, tamen kun lokaj loĝantoj interkompreniĝadis litovlingve. Iu loka kamparano transdonas rememorojn de sia onklo Mykolas Aleksonis: „Nia onklo estis ĉarpentisto. Kiam kuracisto Zamenhof ekloĝis en Veisiejai, li petis la onklon fari en lia loĝejo ian riparon. La onklo scipovis nenian alian lingvon krom sia gepatra, la litova, sekve kun la kuracisto parolis nur litovlingve. Poste Zamenhof, renkontinte mian onklon surstrate, salutadis lin litovlingve kaj demandis: „Kaip jūsu sveikata?“ (Kiel vi fartas?). La onklo rediradis „Dėkiu, daktare!“ (J. Petrulis, „Fragmentoj pri Zamenhof en Veisiejai“, Heroldo de Esperanto, 1959, nr. 6).

Siajn rememorojn pri Zamenhof kelkfoje publikigis aŭ rakontis ankaŭ la bofratino de d-ro Zamenhof, Teresa Zilbernik-Kocin: „Ludoviko kaj Klara interkonatiĝis en Kaunas. Foje Zamenhof en nia hejmo restadis ĉirkaŭ dek tagojn. Li esprimis deziron daŭre restadi en Kaunas. En unu el la leteroj al Klara, Ludoviko i. a. skribis: „Via horizonto plezurigas mian koron“. Restis kelkaj leteroj de Klara kaj Ludoviko.

Dezirinde, ke ne estu forgesita ankaŭ la karakterizo de T. Zilbernik-Kocin pri ŝia bofrato, d-ro Za-

menhof: „Kiam Zamenhof diris al siaj proksimuloj pri sia intenco eldoni libron pri internacia lingvo, ili opiniis lin nenormala homo kaj estis certaj, ke lia revo estas ne-realigebla.

Nur mia paĉjo (Aleksandro Zilbernik, komercisto en Kaunas, bopatro de d-ro L. Zamenhof — rim. de la redakcio) komprenis Zamenhofon, volonte helpis lin, donis al li la necesajn rimedojn por eldono de diversaj broŝuroj. Mia paĉjo la unua ellernis Esperanton kaj korespondadis kun Zamenhof esperantlingve. Laŭ vortoj de mia patro, Zamenhof estis homo sen galo, la boneco mem, li ne komprenis, kiel oni povas koleri, iun ajn ofendi, kaj pro tio estas facile imagi, kiel Zamenhof suferis, kiel doloris al li la koro, kiam ĉirkaŭ li regis nur hommalamo!“ („Litova Stelo“), 1937, nr. 4, p. 4).

En sia artikolo „La restado de Zamenhof en Veiseje“ (Nuntempa Bulgario, 1960, nr. 11) A. Holzhausz esprimas dubon pri kelkaj datoj de la restado de Zamenhof en Litovio, donitaj en la menciitaj de ni kaj aliaj fontoj. Tio instigas al plua studado por precizigi ĉi tiun demandon. La prezentitaj fragmentoj el la biografio de Zamenhof transdonas al ni trajtojn de la nobla persono, montras al ni la harmonion inter lia verkaro kaj persone-

co kaj ili ne devas fali al forgeso, se oni ne sukcesos konstati la precizajn datojn de ilia okazo. Jam multe pli gravas tio, ke Litovion li konsideris sia patrolando, kaj pri tio publike deklaris 21. VIII. 1907 en Londono dum akcepto ĉe la urbestro:

„Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun neniam alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu



Kiam la popoloj povas kompreni, kiam ili ĉesos ĉirkaŭi sin malami.

L. Zamenhof

vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj, aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj! Ho, patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco de la tero, kiu lin naskis!“ (K. Brüggemann, Historio de Esperanto, Dresden, 1923, p. 65—66).

Duan gravan tezon, karakterizantan la ligojn de Zamenhof kun Litovio, esprimis la eminenta biografisto de d-ro L. Zamenhof, Marjorie Boulton: „Oni kredas, ke la kreado de la internacia lingvo tra iris sian lastan stadion en Veiseje“ (M. Boulton, ZAMENHOF, La Laguna, 1962, p. 46).

J. PETRULIS

(El „Horizonto de Soveta Litovio“ 1979)

Okaze de la 100-jara Jubileo de Esperanto en la litova urbo Kaŭnas (kie d-ro L. Zamenhof gastadis, vizitante sian estontan edzinon Klara) okazis „Zamenhofaj Tagoj—87“.

Partoprenis 260 geesperantistoj el la 7 respublikoj. Krom litovoj, latvoj, estonoj, rusoj, blank-rusoj, ukrainoj estis ankaŭ gastino el Erevano (Armenio).

Du tagojn daŭris la arango. La unuan tagon la programo daŭris ĝis malfrua vespero.

Post la solena malfermo ni aŭskultis la fonograman voĉon de L. Zamenhof (de la jaro 1905), paroladojn de la prezidanto de la Litova Filio de ASE docento L. Skupas, de la vicprezidanto P. Jegorovas. La plej malnova litova esperantisto Ant. Poŝka rakontis pri la unuaj jaroj de la E-movado en Litovio. Pasvalisanino Br. Aukštikalnicke kaj aliaj transdonis siajn im-

presojn pri la Universala Kongreso en Varsovio dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. Post la movaĵoj pri la UK, oni revenis al la E-movado en Litovio, en Sovetunio, pritraktis la problemojn pri disvastigo de la sporto, esperantaj tendaroj k. a. Jegorovas rakontis pri la antaŭviditaj por eldono esperantaj libroj: B. Truoga, „Arbaro de dioj“, K. Donelaitis, „Jaro“ k. a.

La partoprenantoj en la arango ĝuis grandan koncerton. Bele prezentigis kaŭnasanoj, koruso el Panevezys, kuracistino A. Jacinkevičienė el Pasvalys, V. Bujako el Minsk per ĉina kaj japana gimnastik-ekzercado.

La lastan tagon en Kaŭnas ni vizitis la Zamenhofajn kaj esperantajn lokojn en la urbo. Ni disigis kun belaj kaj afablaj impresoj.

U. BLAUZDIUNIENE

SUKCESA BULGARA-HINDIA SCIENCA EKSPERIMENTO

Rezulte de fruktodona kunlaborado kun bulgaraj sciencistoj, Hindio farigis la tria lando en la mondo post Usono kaj Bulgario, en kiu efektiviĝis transplantado de embrioj ĉe bubaloj laŭ nehirurgia maniero.

Surbaze de multjaraj ligoj inter la Bulgara Agrikultura Akademio kaj la Pangaba Agrikultura Universitato en urbo Ludiana, en februaro 1988 bulgaraj kaj hindiaj sciencistoj faris komunan eksperimenton — 15 transplantadoj de embrioj, efektivigitaj en tri lokoj en la ŝtato Pangabo. La transplantado de embrioj ebligas kreon de altproduktivaj bestoj kaj havas grandan estonton.

La atingoj de Bulgario provokis grandan intereson en Hindio, pri kio atestas la fakto, ke speciale organizitan seminaron kun bulgaraj specialistoj partoprenis pli ol 80 hindiaj sciencistoj el la tuta lando. La kunlaborado inter sciencistoj de ambaŭ landoj sur la kampo de bubalbredado disvolviĝos en du ĉefaj direktoj — transplantado de embrioj kaj intersango de genetika materialo.

La pangabaj ĵurnaloj „Tribune“ kaj „Indian Express“ kaj la pangaba televido substrekiis, ke per la helpo de bulgaraj sciencistoj por la unua fojo en Hindio estis efektivigita komplika eksperimento en tiu ĉi fako de la scienco.

Valeri NATAN

(El „Rabotničesko Delo“, 16. 2. 1988, kun mallongigoj)

EN LA INSTITUTO POR KURACADO DE FREMDLANDANOJ

LA 7-a DE APRILO —
TAGO DE
MEDICINISTOJ

Ce la Medicina Akademio en Sofio ekzistas specialigita Instituto por Kuracado de Fremdlandaj Civitanoj. En ĝi laboras spertaj medicinistoj. Pro ĝiaj populareco, bonaj rezultoj kaj perspektivoj, en la Instituto alvenas multaj demandoj el diversaj landoj. Jen iuj el ili:

— De kiam funkcias la Instituto por Kuracado de Fremdlandaj Civitanoj?

— La Instituto estis organizita antaŭ pli ol 8 jaroj. La flegado estas modela, senripoĉa. Apartan aŭtoritaton ĝuas la klinikoj pri oftalmologio, neŭrokirurgio, ortopedio kaj traumatologio.

— Kiaj estas la kondiĉoj de kuracado en la Instituto?

— La kondiĉoj estas favoraj, la taksoj — relative moderaj. La restado en la Instituto inkluzivas plenan pensionon, kuracrimedojn. Tranoktado en unulita ĉambro kostas 55 usonajn dolarojn, en dulita ĉambro — 45 usonajn dolarojn, en trilita ĉambro — 35 usonajn dolarojn. Profesora esploro kostas 30 usonajn dolarojn, docenta esploro — 20 usonajn dolarojn. Plena profilaktika kontrolo kaj esploro kostas 120 usonajn dolarojn, kaj hospitala profilaktika esploro kun tritaga restado — 280 usonajn dolarojn.

— Ĉu en la Instituto estas aplikataj iuj specialaj esploroj kaj kuracmetodoj?

— Jes, en la Instituto pri Nefrologio ĉe la Medicina Akademio funkcias Centro pri Litotripsio. La Centro estas ekipita per moderna aparataro de la firmao „Dornie“ (FRG). La medicina skipo sub la gvido de prof. Kumanov kaj doc. Budevski specialigis en FRG.

— Kio estas litotripsio?

— La litotripsio estas moderna metodo por

eksteroperacia kaj sendolora forigo de renŝtonoj. La saniga kaj socia efekto de tiu metodo estas grandega — post proksimume 30 tagoj, inkluzive la esplorojn kaj la procedurojn, la paciento estas tute sana kaj laborkapabla. La prezo por unu litotripsio estas 800 usonaj dolaroj — ĝi inkluzivas kuracadon, 3-5-tagan restadon kaj la kuracilojn necesajn por la readapta periodo. Tiu prezo estas ekskluzive modera kompare kun la taksoj por kuracado en similaj centroj en okcidenta Eŭropo kaj Usono.

— Ĉu estas aplikataj aliaj modernaj metodoj de kuracado?

— La plej moderna nuntempa metodo estas tiu pri eksterkorpa neoperacia detruo de galaj ŝtonoj (kolelitiazo).

— Ĉu en la Instituto oni kuracas kor-vazajn malsanojn?

— Ĉe la Medicina Akademio funkcias ankaŭ Kliniko pri Korvaza Kirurgio. Sub la gvido de prof. Ĉirkov el la Universitato en Freiburg (FRG) oni faras plej komplikajn operaciojn, inkluzive transplantadon de koro. La prezoj estas pli moderaj ol tiuj en samrangaj klinikoj en okcidenta Eŭropo kaj Usono.

Do, profitu la avantaĝojn proponatajn de la Instituto por Kuracado de Fremdaj Civitanoj ĉe la Medicina Akademio en Sofio.

A. GRIGOROV

prof. K. POPOV

Granda amiko de la bulgaraj esperantistoj

Docento J. Z. Portnoj — 70-jaraĝa

Josif Lazareviĉ Portnoj estas konata al la bulgaraj sociagantoj. Antaŭ deko da jaroj la sindikata eldonejo „Profizdat“ publikigis en bulgara lingvo lian verkon pri la ligoj inter la sovetaj kaj bulgaraj profesiaj unuiĝoj dum la periodo de faŝisma diktaturo kaj ĝis niaj tagoj. En „Bulgara Esperantisto“ tiu soveta scienculo publikigis vicon da artikoloj pri la frataj ligoj inter sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj. Li estis invitita partopreni kelkajn scienc-praktikajn konferencojn, organizitajn de BEA, lige kun gravaj jubileoj de historiaj eventoj: 60 jaroj de la Septembra Ribelo 1923, 40 jaroj de la Naŭseptembra socialisma revolucio en Bulgario, 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio. Liaj raportoj antaŭ tiuj konferencoj aperis en la koncernaj libro-kolektoj. Aktuale antaŭstaras la publikigo de du liaj verkoj, tradukitaj el la rusa en bulgaran kaj en Esperanton: „La kontribuo de sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj al la plifirmigo de l'amikeco inter la popoloj de USSR kaj PR Bulgario“ kaj „Ĉe la fontoj de la soveta-bulgara amikeco. Paĝoj el la vivo kaj agado de akad. Sergej Boev“ (Pri akad. Boev vidu n-ran 1 de „BE“ de la nuna jarkolekto).

Docento Portnoj ne estas esperantisto. Tamen kiel historiisto li ekinteresiĝis ankaŭ pri la agado de sovetaj kaj bulgaraj esperantistoj lige kun la temo pri amikeco inter la popoloj de Sovetunio kaj de Bulgario. Li longe kaj persiste serĉis koncernajn ma-

terialojn jam de la komenco de la dudekaj jaroj pri la esperantista kontribuo tiurilate. Rezulto de liaj eltrovoj estas la menciitaj du verkoj kaj multaj artikoloj.

Kiel ni informiĝis, en la Politeknika Instituto de Karaganda (Kazaĥa Soveta Socialisma Respubliko), kie studas 14 mil studentoj, far la instituta estraro, partia komitato kaj la ceteraj publikaj organizajoj en la Instituto estis organizita solena celebrego de la 70-jariĝo de doc. Portnoj. Lige kun tio la Centra Estraro de BEA direktis al la jubileulo arte preparitan salutadreson.

Jen kion skribas en la instituta gazeto doc. V. Katarĵnov, afergvidanto de la Katedro pri Scienca Komunismo:

„Josif Lazareviĉ Portnoj trapasis longan kaj gloran vojon. Antaŭ la Granda Patrolanda Milito de Sovetunio li laboris en uzino kaj vespere vizitis universitaton. Jam en la unuaj tagoj de l'milito li stariĝis en la vicoj de la defendantoj de l' Patrolando. Li brave batalis ĉe Stalingrado kaj Kievo, same en la ĉebaltaj respublikoj, estis kelkfoje vundita. Pro batalmeritoj oni aljuĝis al li la altajn milit-ordenojn „Ruĝa Standardo“ kaj la „Patrolanda Milito“, same multajn militmedalojn.

Post la milito li sukcese finis sian universitatan studadon, fariĝis aspiranto, ver-

kis scienca disertacion. Pli ol kvardek jarojn li aktivis sur la scienca kampo kiel lekciisto kaj scienculo en diversaj altlernejoj. Dum la duono de tiu periodo li laboris en la Politeknika Instituto de Karaganda.

Dum la jaroj de sia scienca kariero li preparis kaj publikigis ĉirkaŭ 120 sciencajn verkojn: monografioj, broŝuroj k. a. Liaj verkoj estas publikigitaj en 11 lingvoj de la popoloj de Sovetunio kaj de iuj socialismaj landoj: Bulgario, GDR, Pollando, Popola Koreo, Mongolio.

Ĉefa direkto de lia scienca agado estas la problemaro de la internaciaj ligoj de laboruloj de Kazaĥio kun aliaj popoloj el eksterlando. Li faris sciencajn pristudojn en vico da socialismaj landoj kaj parolis antaŭ internaciaj kontraŭfaŝismaj mitingoj.

Docento Portnoj organizas grandan edukan laboron inter la studentaro, en la medioj de la loĝantaro de Karaganda kaj aliaj urboj. Li estas scienca sekretario de la Katedro pri Sociaj Sciencoj kaj vicedro de la Seminario pri Scienca Komunismo ĉe la Regiona Komitato de KPSU.

Ankaŭ ni — bulgaraj esperantistoj, bondeziras al docento Portnoj plurajn jarojn de bona sanstato kaj novajn sukcesojn en lia nobla scienca agado.

N. BOGDANOV

TALENTA ESPERANTO-POETO

Dimităr Zlatarski 85-jara

La nomo de Dimităr Zlatarski estas konata en nia lando. Li apartenas al tiuj malmultaj homoj, kiuj havas daŭrajn interesojn al diversaj branĉoj de la scienco. Per seriozaj kaj profundaj esploroj Zlatarski signife kontribuis al nia scienco kiel historiisto, arkeologo, natursciencisto...

Naskita en 1903 en urbo Varna, jam kiel junulo li interesiĝis pri naturscienco, historio, literaturo, tamen lia revo studi en universitato ne realiĝis kaj li eklaboris kiel instruisto en diversaj vilaĝoj ĉirkaŭ Sumen kaj Varna.

Dank' al sia persista memkleriĝo kaj forta intereso al la scienco, li komencis detale esplori la naturon

Kulturo", „Heroo de Socialisma Laboro" k. a.

Sed por la Esperanto-legantoj el la tuta mondo li estas kaj estos talenta Esperanta poeto, kiu riĉigis nian poezion per belegaj poemoj.

Dimităr Zlatarski komencis lerni Esperanton kiel gimnaziano en 1921-1922. La Lingvo Internacia ravis lin per sia belsoneco kaj ne postlonge li faris siajn unuajn provojn en la originala Esperanta poezio. Liaj unuaj poemoj aperis en revuo „Esperanto Triumfonta", redaktata de la konata esperantisto-jurnalisto Teo Jung. Tio impulsis la junan poeton kaj li komencis pli aktive kontribui al diversaj Esperanto-revuoj kiel „Bulgara Es-

la popolan sopiron al libero, justeco, kaj per revoluci-romantika patoso la poeto inspire priantis la ribelon.

La poemo „Fajrego dum septembro" riĉigis la originalan Esperanto-poezion per novaj poeziaj rimedoj. Ĝia ritmo estas anhela, streĉa, la rimoj — trafaj, tintaj, la komparaĵoj kaj metaforoj — originalaj kaj elokventaj.

La unua parto de „Fajrego dum septembro" aperis jam en 1924 en „Bulgara Esperantisto". Tiam redaktoro de la revuo estis la progresema esperantisto kaj komunisto Panajot Kolev.

Antaŭ la liberigo de nia lando el sub la faŝismo, Zlatarski dediĉis multajn poemojn al la akraj sociaj problemoj, al la klasbatalo, sed en lia poezio abundas same poemoj pri la naturo, pri la amo, pri la plej noblaj homaj sentoj.

Multajn poemojn Zlatarski verkis pri la Nigra Maro. Naskita en Varna, li pasigis sian junecon apud la maro kaj ĝuste la maro vekis en li la poeton.

En intervjuo Zlatarski konfesas: „Por mi la maro estas io konkreta, sen kio mi ne povas ekzisti. Mi estis enamiĝinta en la maron. Kiel junulo dum horoj mi pasigis en la maro kun boato kaj fakte tiam, kiam mi estis sur la mara vasto, naskiĝis miaj poemoj, en kiuj mi esprimis la penson, ke la maro estas simbolo de la eterna vivo."

Dum la lastaj jaroj Zlatarski verkis plurajn poemojn pri la nova vivo en nia lando, pri la paco, pri Esperanto, sed bedaŭrinde ĝis nun ne aperis memstara poemaro de tiu ĉi elstara Esperanto-poeto. Nur la antologio „Rozo kaj glavo" dediĉas sufiĉe ampleksan lokon al lia inspira kaj talenta Esperanta poezio.

Ĉi-jare Dimităr Zlatarski festas sian 85-jaran jubileon. Okaze de ĉi jubileo ni danku al li por lia belaj poezio kaj ni bondeziru al li sanon kaj ankoraŭ longajn jarojn de aktiva kreado.

Georgi MIRALKOV



Vizito ĉe D. Zlatarski. De maldekstre dekstren: Canko Murgin, Evgeni Georgiev, la jubileulo Dimităr Zlatarski kaj Georgi Mihalkov

kaj pristudi la historion de la regiono, en kiu li loĝis kaj laboris.

En urbo Dălgopol, kie li loĝas ĝis nun, li fondis lernejan muzeon kun riĉa historia kaj arkeologia kolekto. Tiu muzeo iĝis bazo de la granda urba muzeo, kies respondeculo kaj longjara direktoro estis Dimităr Zlatarski.

Pro sia ampleksa kaj celkonscia scienca agado Zlatarski estas distingita per multaj ordenoj kaj honoritiloj kiel „Merita Instruisto", „Popola Aganto de la Arto kaj

perantisto", „Literatura Mondo", „Balkana Laboristo" k. a. Liaj ŝatataj Esperanto-poetoj kaj instruistoj en la Esperanto-poezio estas Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy.

La kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923 forte emociis Zlatarski kaj al tiu ĉi grandioza historia evento li dediĉis unu el la plej belaj siaj poemoj „Fajrego dum septembro". Per tiu ĉi poemo Zlatarski sukcesis talente kaj majstre interpreti la furiozon de la ribelo,

Zlatarski — naturesploranto

En la vivo de la instruisto Dimităr Zlatarski Esperanto kun ĝiaj ideoj pri amikeco kaj paco inter la popoloj estas la unua luma fenestreto al la granda mondo. Plian veran plezuron al li havigis liaj naturesploraj okupoj kiel sekvan- to de la ĉeĥaj naturscienculoj — fratoj Karel kaj Hermengild Skor- pil, loĝantaj kaj laborantaj komen- ce de nia jarcento en Bulgario.

La plej grava sciencia atingo de Zlatarski estas la elfoso antaŭ pli ol dek jaroj en la regiono de la loko Usoe, proksime al vilaĝo Asparu- ĥovo (Orienta Bulgario), de resta- ĵoj de neolitika loĝloko de la fino de la sesa jarmilo antaŭ nia erao.

Estante gimnazia lernanto en Varna, lia instruisto estis Karel Skorpil. En 1935 Zlatarski jam estis instruisto en Dalgopol. Tiam li entreprenis arkeologiajn elfosa- dojn je siaj propraj kostoj. Li mal- kovris valorajn objektojn: vazojn el la neolitiko, paleolitiko, el la epoko de tracoj kaj helenoj. Poste li kolektis armilojn, popolkostu- mojn, ornamaĵojn kaj ikonojn.

Tiutempe Zlatarski komencis aranĝi muezon, kiu estis malfermi- ta en 1963 en speciale konstruita por la celo domo. Kompreneble, li ne estis sola. Li ĉiam havis mul- tajn helpantojn, junajn kaj malju- najn, ĉar li scipovis inspiri la ho- mojn kaj veki ĉe ili senton de krei- veco.

En 1930, estante nur 27-jara, li jam sendadis sciencajn komuni- kaĵojn al la Bulgara Akademio de Sciencoj.

Krom instruisto, arkeologo kaj kolektanto, Zlatarski estis ankaŭ entomologo.

La eminenta bulgara entomologo prof. Ivan Bureš diris pri li: „Foje en 1930 venis en miajn manojn la sciencaj komunikaĵoj de Dimităr Zlatarski. Pli ol unu jardekon li liveradis komunikaĵojn pri ekster- ordinare raraj specioj de papilioj kaj ties vivregionoj. Ĝis nun estas enigmo por mi kiel homo sen solida

universitata klereco povas disponi pri tiom da ampleksaj scioj kaj spertoj.“

Sian papilian kolekton, taksitan je 1 miliono da levoj (1940), Zla- tarski donacis al la Paleontologia Fakto de la Natursciencia Muzeo en Sofio. Post la latina notacio de unu el la specialaj ekzempleroj oni povas legi ankaŭ hodiaŭ la nomon Zlatarski.

La vivo de Dimităr Zlatarski, sen helaj briloj, estas senĉesa bru- lado, varmiginta multajn homojn kaj lumiginta kaŝitajn anguletojn de nia naturscienco pri la regiono de rivero Kamĉija en Orienta Bul- gario. Pli ol duonjarcento da kul- tura vivo en Dalgopol estas nedisi- geble ligita kun la nomo kaj agado de Zlatarski. Li estas animo de ĉiu evento, de ĉiu iniciato en la kultu- ra sfero. Dimităr Zlatarski verkas ankaŭ artikolojn kaj eseojn, estas kunaŭtoro de valoraj arkeologiaj verkoj.

Evgeni GEORGIEV

Dimităr ZLATARSKI

ELDORADO

*Tiam sciuj:
Lando tiu
estas la serĉata
Paradiz' b.ata —
Eldorado!*

E. A. Poe

Al Land' nekonata,
al Lando beata
mi ŝpon direktis — ŝipestro sentimal
sen laco, sen staro
sur vastoj de l'maro
persiste mi vagis tra mondo senlima.

Sed venis la nuboj,
ekregis la duboj:
ĉu vere ekzistas la Lando feliĉa?
Densigis nebuloj,
laciĝis okuloj
kaj mia malforto ekflustris: sufiĉel

Sed tiam vizia
sireno gracia
el ondoj alnaĝis, al mi ekparolis:
la Landon beatan,
la mondon revatan
ja vane ĝin trovi ekstere vi volis!
Vi veku korflamon,
fortigu la amon —
vin tutan fordonu por homa bonstato!
Kaj estos trovita
la lando de l'Mito
kaj sciuj: vi vivos en mem Eldorado.

APELO

Dediĉita al Asen Grigorov

La pacifismo montris jam multfoje
Kadukan senpovecon. En bataloj
armite oni revu kaj heroe
defendi devas siajn idealojn!

Internacia lingvo — bela revo
de l'homoj, estas jam realo.
Sed lingvo ne sufiĉas — nia devo
nun estas fari ĝin armilo ŝtala!

Ne taŭgas pacifismo utopia.
Nun star ekster lukto estas krimo!
Dum ni „senpolitike“ fantazias,
militarismo rabas da viktimoj.

Amikon havis mi en land' korea,
sed li post la milito eksilentis.
Ĉu falis brave sub standard' arma,
aŭ bombo trafis lin sub hejm-tegmento?

Kun Lena — pola amikin' — nin ligis
gefrataj koraj sentoj, sed faŝistoj
turmentis ŝin kruele kaj pendigis.
Do mi etendu manon al murdistoj?

Leteron vi atendas de amiko
el Hanoi, Santiago, Rodezio —
ho, mortis li sub nigra sun' Afrika,
sub sanga sun' Vjetnama aŭ Ĉilal

INTENSA KURSO DE ESPERANTO EN KUBO

La kurso estis planita surbaze de la sperto akirita en Jambol, en aprilo 1986. Laŭ tiu ĉi plano, la instruado de Esperanto devis daŭri dek tagojn, unu el kiuj por ekzamenado, kaj dum la ceteraj naŭ tagoj oni instruu po naŭ instruhorojn, t. e. de la mateno ĝis la vespero.

Bedaŭrinde diversaj obstakloj malpermesis la realigon de la planita instrutempo. Ni modifis la instruadon: dum 13 tagoj, vespere (post la ĉiutagaj oficaj okupoj de la kursanoj) po kvar instruhoroj kun paŭzo de 10 minutoj post la unuaj du instruhoroj. La instruado komenciĝis je la 18-a horo kaj finiĝis je la 21-a kaj 10 minutoj. Ĉiu instruohoro daŭris 45 minutojn. La instruohorojn ni difinis tiel: la unuaj du estis prezento de nova lingva materialo (leksiko kaj gramatiko) kaj la sekvaj du estis destinitaj por ekzercoj pri la jam instruita materialo. Ambaŭ instruistoj — Marin Bačev, ĉefa gvidanto kaj respondeculo pri la kurso, kaj Eva Bojaĝieva, kuninstruisto, instruis alterne. Dum la instruado kaj la ekzercado ni aplikis diversajn instruhelpilojn, kiujn ni ĉiufoje elektadis elinter tiuj en niaj ĉambroj: kasetofono kun kasedoj, bildoj, kalendaroj kun bildoj, ludkartoj kun bildoj kaj Esperanta teksto, faldfolioj, libroj, pupoj, kovertoj kun poŝtmarkoj kaj multaj aliaj, kiuj helpis nin

eviti vortumadon en iu nacia lingvo. Dum la ekzercadhoroj ni strebis paroligi la kursanojn. Je la fino de ĉiu lasta ekzercohoro ni instruis al la kursanoj mallongajn kaj facilajn belsonajn kantojn kun amuza enhavo, kio ege plaĉis al ili. En la dua semajno ni malpliigis per unu horo la ĉiutagajn ekzercojn, ĉar ni bezonis tempon por instrui la ceteran antaŭviditan lingvan materialon. Tion ni faris pro la fakto, ke ni bezonis 81 instruohorojn (laŭ la plano: instrui dum 9 tagoj po 9 instruohoroj) kaj ni havis je nia dispono nur 52 horojn (13 tagoj po 4 instruohoroj)!

Dum la tuta daŭro de la kurso, ĉeestis deko da esperantistaj instruistoj, kun kiuj post la fino de la instruohoroj ni interŝanĝis opiniojn aŭ respondadis al iliaj demandoj.

La kursanoj estis entute 24 personoj, inter kiuj ankaŭ gejunuloj. Ĉiuj lernis kun fervoro. Komence helpadis al ni dum la instruado iu bona loka esperantisto, kiu foje devis klarigi al la kursanoj iun vorton en ilia gepatra lingvo, ĉar ni parolis nur en Esperanto kaj, bedaŭrinde, neniu el ni posedis la hispanan lingvon. Post kiam oni havigis al ni vortaron dudirektan pri Esperanto kaj hispana lingvo, ni ne plu bezonis ies ajn helpon. Ĉiu kursano laboris serioze kaj partio-

Sub hispana ĉielo

(Daŭrigo de n-ro 3/1988)

EN BARCELONO — ĈE NOVAJ AMIKOJ

La centra stacidomo de Barcelono — Sants, estas monstro, kaŝita subtere, muĝanta, fajron elspiranta, sufoka. . . Ĉi minute vagonaroj forveturas kaj alvenas — bruego neeltenebla. . .

En Barcelono ni alvenis frumane. Tenante enmane kajeron de „Bulgara Esperantisto“, ni sidis en unu el la grandaj haloj de la stacidomo, atendante ke nin rekonu laŭ ĝi la nekonataj gastigantoj-esperantistoj. Subite antaŭ ni ekstaris knabo kun Esperanto-vortareto enmane, gentile ridetanta. Nur post momento venis alia knabo kun bluzo verdstele pentrita. Tio estis niaj unuaj konatoj en Barcelono — la 16-jara Ferriol kaj la 14-jara Felip, venintaj renkonti kaj bonvenigi nin. Tiuj du knaboj perfekte parolis Esperanton! Evidentiĝis, ke ili estas estraranoj de HEJS (Hispana Esperantista Junulara Societo). Post duonhoro ni estis en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio — „Libreria Esperanto“ — sur strato Candi, kie nin amike bonvenigis la prezidanto de HEF s-ro Salvador Aragay.

Niaj gastigantoj esprimis sian grandan kontenton kaj sinceran gojon, ke ili havas la eblecon konatiĝi kun bulgaraj esperantistoj. S-ro

Aragay planis por ni renkontigon kun membroj de HEF por la sama vespero. Post mallonga babilado kaj matenmango ni jam estis en la aŭtomobilo de nova amiko — Andres Falkon, kune kun nia juna ĉiĉerono Felip. Nin atendis emociaj travivaĵoj — tuttaga ekskurso tra Barcelono, la dua laŭ grandeco kaj signifo — urbo en Hispanio — la ĉefurbo de Katalunio. Tute ne eblas trarigardi Barcelonon en unu tago — eĉ per aŭto! Tiu amfiteatre situanta ĉe la Mediteranea marbordo urbejo, al kies multnombraj kajoj albordeĝas centoj da ŝipoj el ĉiuj partoj de la mondo, posedas ege multajn vidindaĵojn.

Du montopintoj — Tibidabo (en la norda parto) kaj Montjuik (sudokcidente) limigas la centran teritorion de Barcelono, kies longo estas preskaŭ sep kilometroj, sed „Granda Barcelono“ kun la antaŭurbaj regionoj estas 40 kilometrojn longa. La dumiljara urbo impresas per diversaj arkitekturaj stiloj, ĉie pace kunvivadas ruinoj de konstruaĵoj kaj monumentoj — atestantoj de diversnaciaj kaj dinastiaj regadoj kaj tute modernaj imponaj arkitekturaj verkoj de talentaj majstroj. Multaj el ili estas kreaĵoj de Antonio Gaudi, kies ĉefverko sendube estas la preĝejo „La Sankta Familio“, kies konstruado komenciĝis en 1882 antaŭ pli ol 105 jaroj! kaj ĝi ĉiam ankoraŭ ne estas finkonstruita. Kiel

kreaĵon de la homa genio oni komparas ĝin kun la Heopso piramido. Atinginte per rapida lifto la 105-an etaĝon de unu el la ok finkonstruitaj turoj, antaŭ niaj ravitaj okuloj sin malkovris la neimageble belega panoramo de Barcelono.

De sur la alia montopinto Montjuik, kien veturigis nin per sia aŭto la senlaca amiko Falkon, la urbo-panoramo estis tute alia — tamen ne malpli belega. Sur la muregoj de la defendbastionoj kuŝis grandaj kanonoj el pasintaj epokoj — eksponaĵoj de la Milita Muzeo. Sur unu el la deklivoj estas aranĝita naturekspozicio el diversaj kaj plej raraj specoj de kakttoj el ĉiuj partoj de la mondo. De ĉi tie oni povas ĝui la panoramon de la mondfama haveno de Barcelono, kie troviĝas ankaŭ la modelo de la ŝipo de admiralo Kolumbo „Santa Maria“, vizitata de miloj da turistoj. Sur Paseo de Colon n-ro 6, proksime de la impona monumento de Kolumbo, loĝis Migel de Cervantes. En tiu domo li finverkis la romanon „Donkiĥoto“.

Sur strato Montcada n-ro 15, en la iama palaco de la nobela familio Aguilar, estas aranĝita la Muzeo de Picasso. Sur la muroj de kelkaj konstruaĵoj en la urba centro oni povas vidi freskojn de la mondfama pentristo.

Barcelonanoj sin preparis por la festo de la urbo, tradicie okazanta fine de septembro — ĉiuj ĉefaj stratoj jam estis solene kaj bunte ornamitaj. Speciale altiris la atenton la ornamaĵoj de la centra urba placo Katalunio, sur kiu oni povis vidi eĉ modelon de la Moskva preĝejo „Vasilij Blajennij“. . .

Ni havis la bonŝancon spekti ka-

prenis aktive (laŭ siaj eblecoj, konoj kaj kuraĝo) la ekzercojn kaj la instruadon mem. Ĉiuj ili ekzamenigis. La rezultoj estas jenaj: la noton „bonege“ ricevis 5 personoj; „tre bone“ — 8 personoj; „bone“ — 7 personoj; „meze bone“ — 4 personoj.

Kiel oni povas facile konstati, la rezultoj ne estas tiuj, kiujn ni povus aŭ volus atendi post fino de simila kurso. Kaj ni mem, ambaŭ instruistoj, ne estas tre kontentaj de tiuj ĉi rezultoj. Nia opinio la kialoj estas jenaj:

a) Ne sufiĉis al ni preskaŭ 30 instruohoroj por plifirmigi la akiritajn de la kursanoj konojn, ĉar la intensa metodo estis modifita de 81 al 52 instruohoroj;

b) la kursanoj ne povis „droni“ en la lernata lingvo (baza elemento de la metodo), aŭskultante la Esperanto-parolon dum instruado kaj ekzercado dum naŭ tagoj (!) po naŭ (!) instruohoroj.

c) mankis la ebleco utiligi la helpon de la grupaj helpantoj (baza elemento de la metodo) elinter la lokaj esperantistoj, pro la ŝanĝita instruohoraro kaj pro la nova instrutemo;

ĉ) ni malpliigis per unu horo la ekzercojn dum la dua semajno, por ke ni instruu maksimumon de la planita lingva materialo.

Sed tamen nia intensa kurso estis bonega sukceso da alilanda (bulgara) instrumaniro, kion la kubaj Esperantoinstruistoj ĝis nun ne estis spertintaj, ĉar ili instruas plej ofte uzante nur blankan kreton. . . Multaj el la ĉeestantaj kolegoj-instruistoj estis ege kontentaj de la sperto, kiun ili akiris de nia instruado kun belsona kaj korekta elparolado.

Unu kursano surbendigis nian instruadon dum la tuta tempo. Ni donis al li ses kasedojn, por ke li resurbendigu elektitajn partojn de nia instruado kaj poste sendu ilin al ni.

Post la fino de la kurso, kiam la sekvan tagon ni anoncis la rezultojn, estis organizita kortuŝa amika vespero. Oni multe kantis en Esperanto, en hispana kaj . . . en bulgara lingvoj. Ni ricevis etajn donacetojn de la kursanoj. Ankaŭ ni donacis al ili librojn, gramonfondiskojn, bildkartojn, insignojn, faldfoliojn k.a.

Konklude ni povas diri, eĉ se tio sonus iom malmaldeste, ke nia instrulaboro en Kubo kreis sinceran amikecon inter kubaj kaj bulgaraj esperantistoj.
*Havano-Sofio,
januaro 1988*

Marin BACEV



Antaŭ la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio. De maldekstre dekstren: la patro Aragay, d-rino V. Danĉeva, A. Falkon, Salvador Aragay (prezidanto de HEF) kaj D. Ĥitrov.

talunajn rondodancojn „sardana“, plenumatajn laŭ malnova popola tradicio sur la placo antaŭ la fama gotika katedralo, de diversagaj amatoroj. Estas vera plezuro vidi tiun amason da homoj (konataj kaj nekonataj), unuigitaj de la nura deziro danci „sardana“.

Jam vesperiĝis, kiam ni revenis en la sidejon de HEF, plenplenaj de impresoj kaj tamen vidintaj nur tre malgrandan parton de tiu ĉarma urbejo, pri kiu barcelonanoj verkis multajn kantojn.

Jam venis la tempo por nia renkontiĝo kun la membroj de HEF. Katalunianoj estas famaj per sia

gastamo kaj ni mem spertis tion. Ĉeestis kelkdekoj da HEF-anoj. S-ro Aragay prezentis nin al la publiko kaj petis nin rakonti pri la bulgara esperantista movado. La intereso estis granda kaj mi ĉiuj sukcesis respondi al ĉiuj demandoj. La gejunuloj montris specialan intereson pri nia junulara agado kaj pri niaj internaciaj laborbrigadoj, en kies vicoj dum la pasintaj jaroj ne mankis ankaŭ junaj hispanoj. Multaj esprimis dezirojn partopreni ĉi-somere iun el tiuj laborbrigadoj.

En la nomo de la Estraro de BEA mi dekoris s-ron Aragay per ora

jubilea medalo, emfazinte lian kontribuon por la bonaj amikaj rilatoj kaj fruktodona kunlaboro inter HEF kaj BEA. En librovendejo „Esperanto“ troveblas multaj el niaj esperantlingvaj eldonoj, kion ni ŝuldas al la iniciatemo de s-ro Aragay, posedanto de la librovendejo.

Nia renkontiĝo daŭris ĝis malfrua vespero. La etoso estis intima, agrabla, amika. Oni regalis la ĉeestantojn per frandaĵoj kaj laŭ la tradicio — per ŝaŭmanta ĉampano. Estis esprimita deziro organizi pli vastan interŝanĝon de E-literaturo, pli regulan kunlaboradon de niaj E-revuoj.

Kulmino de niaj emocioj estis la brile bela spektaklo de la „kantantaj fontanoj“ antaŭ la Muzeo de l'Arto en la piedo de montopinto Montjuik, kiun kun admiro spektis centoj da homoj. Sub akompano de diversaj melodioj la akvostrioj ĉiutage aliformiĝis en fabele kolorigitajn florojn! . . .

Tiu nokto ŝajne estis senfina: ĉe tablo kun bongustaj bulgaraj manĝaĵoj, preparitaj de d-rino Danĉeva, ni restis en la domo de nia juna amiko Ferriol, ĝis matenigo senĉese babilante pri nia komuna intereso al Esperanto, pri planoj de estontaj komunaj aranĝoj. . .

GASTE AL LA MUZEO DE ESPERANTO EN SANT PAU D'ORDAL

La 20-a de septembro, dimanĉo, estis nia lasta tago en Hispanio. Frumatene, kune kun niaj novaj amikoj ing. Jozefo Miranda (sekretario de HEF) kaj lia simpatia edzino Magda ni jam veturis al la vilaĝeto Sant Pau d'Ordal, kie tro-

KURAGA ANTIFASISTO KAJ SENLA- CA ESPERANTO-AGANTO

Tiel oni plej trafe povas karakterizi k-don Ljuben Grozdanov, kiu antaŭ nelonge fariĝis 70-jara kaj estis solene celebrata de la sofia esperantistaro.

L. Grozdanov naskiĝis en malriĉa instruista familio en la sudbulgara urbo Nevrokop (nun Goce Delčev). Apenaŭ 4-jara, li perdis siajn gepatrojn kaj restis plena orfo. Bonkora parenco kondukis lin kaj lian fratineton en la ĉefurbon kaj sukcesis loki ilin tie en pensiono por orfoj.

Nur 11-jara Ljubčo jam devis perlabori la pecon da pano. Multajn profesiojn li havis kaj multloke li laboris, sed kiel sian ĉefan profesion li opinias tiun de metallaboristo kaj muntisto. Tre frue la sociaj maljustoj, la ekspluatado kaj senrajtigo far la riĉuloj-labordonantoj montris al la junulo la ĝustan vojon de la batalo por nova, pli justa vivo por la laboruloj. Apenaŭ 15-16-jara, li iĝis instiganto al striko en la fabriko, kie li laboris kiel novico. La striko sukcesis, sed la novico estis forpelita el la fabriko. Forpelita estis li ankaŭ el la pensiono. Kaj komenciĝis streĉa vivo, ĉiam sub la minaco de aresto kaj torturoj fare de la faŝista polico. Tiu minaco aparte kreskis dum la milita periodo, kiam lia loĝejo estis fidinda azilo por eksterleĝaj kamaradoj kaj li mem — aktiva membro de komunista grupo kaj fidela partizanhelpanto.



En la tago de la popola ribelo — la 9-an de septembro 1944 — Grozdanov partoprenis diversajn aktivecojn per pafilo en mano.

La popola venko super la monarko-faŝismo malkovris por Grozdanov, samkiel por milionoj da homoj kiel li, la vojon de libereco kaj kulturo. Soifanta sci-ojn, kvankam jam 30-jara, li finis antaŭgimnazion, poste mekano-elektroteknikan lernejon. Ĉie, kie li laboris, li faris sian laboron bonege, pro kio sur lia

vigas unu el la kvar plej grandaj Esperanto-muzeoj en la mondo. Esti en Barcelono kaj ne viziti tiun muzeon estus nepardonebla preterlaso! Do, dank' al la komplezo de tiuj du sindonaj samideanoj ni havis tiun eblecon.

Estis la sezono de rikolto de la vinberoj kaj dumvoje ni vidis multajn ĉevalveturilojn kaj ŝarĝaŭtomobilojn plenplenajn de ĵus rikoltitaj vinberoj — ja ni veturis tra hispana „Ĉampanio“. Ambaŭflanke de la aŭtovojo etendiĝis vinberkampoj, en kiuj laboris multaj vitkulturistoj. En tiu regiono — en la urbeto Vilafranca del Penedès — troviĝas rara rimarkindaĵo: Muzeo de la vitkulturado. Ĝia riĉega ekspozicio, aranĝita en la ĉambroj de duetaĝa domo, prezentas la vinberkulturadon kaj vinproduktadon de antikva tempo ĝis hodiaŭ. Multaj ekspoziciaĵoj estas aŭtentikaj kaj unikaj. Post trarigardo de la ekspozicio la vizitantoj povas (laŭdezire) gustumi la faman en tiu regiono blankan vinon.

La vizito en tiu templo de Bakho plivigligis nian bonhumoron. Amike balilante kaj ŝercante, nerimarkite ni alvenis en Sant Pau d'Ordal, kies dometoj estas dissemataj sur glataj deklivoj laŭ la fluo de malgranda rivereto.

Ĉe la sojlo de novekonstruita blanka unuetaĝa domo nin renkontis la dommastroj de Hispana

Esperanto-Muzeo — gesinjoroj Yzal. Sur la fronta muro vidiĝis tabelo kun la nomo de la strato: „D-ro Zamenhof“ n-ro 12. Nek la imponaj lipharoj, nek la okulvitroj kaj la blanka hararo de la 70-jara s-ro Luis Yzal povis kaŝi lian junecan impeton kaj energion. La gaja, sprita mezstatura viro kaj lia simpatia vivkunulino kondukis kiel gejunuloj. Post reciproka sinprezentado, la dommastroj invitis nin okupi lokojn ĉirkaŭ la tablo kaj regalis nin per dolĉaĵoj kaj per la tradicia glaso de ĉampano. Post la toasty ni esprimis nian komunan ĝojon denove renkontiĝi ĉi-foje sur hispana tero — ĉar en 1982 s-ro Yzal estis oficiala gasto de BEA dum la celebrado de ĝia 75-jara jubileo en Veliko Târnovo. Kor-tuŝite, s-ro Yzal akceptis la oran jubilean medalon, per kiu la Estraro de BEA distingi lin, samkiel la metaloplastan plaketon kun la figuro de d-ro Zamenhof — donaco al la Hispana Esperanto-Muzeo, kies fondinto li estas.

Necesas almenaŭ monato, por ke oni konatigu pli detale kun la riĉega kolekto de tiu muzeo, kies historio estas vere nekutima. Laŭ profesio s-ro Yzal estas farmaciisto kaj jam multajn jarojn li laboras en sia apoteko en Sant Pau d'Ordal — situanta, 40 kilometrojn for de Barcelono, suden laŭ la vojo

al Valencio. La ideo pri kolekto de esperantaj libroj, broŝuroj kaj esperantaj naskiĝis antaŭ multaj jaroj, kiam la juna apotekisto konatigis kun Esperanto kaj iom post iom ekposedis la lingvon. En la komenco sian modestan kolekton li estis aranĝinta en unu el la ejoj de la apoteko, sed post nelonge ĝi jam estis tiom abunda, ke postulis novan ekspoziciejon. Tiel estis konstruita speciala domo, kiu ampleksas 250 kvadratmetrojn kun salono, librotenejo, laborĉambro, granda kunvenejo, kaj eĉ ĉambro por gastoj. Krom la detala kartoteko, s-ro Yzal posedas personan komputeron kaj kseroksaparaton, kiuj multe helpas lian laboron por klasifikado de la muzea kolekto. Ĉio rilatanta Esperanton kaj la tutmondan esperantistan movadon, estas kolektata kaj zorgeme ordigata, katalogita laŭ la decimala sistemo, laŭ deveno kaj laŭ aŭtoroj. Koncizaj statistikaj donitaĵoj sufiĉas, por ke oni havu ĝeneralan impreson pri la riĉaĵoj de la muzea kolekto: 4600 libroj en aŭ pri Esperanto, 1215 turismaj broŝuroj, 3860 jarkolektoj de gazetoj, 1864 skatoloj kun korespondadoj de esperantistoj, pli ol 1000 E-insignoj pri kongresoj kaj aliaj aranĝoj, standardoj kaj flagetoj, kongreslibroj, afiŝoj, glumarkoj, fotografiaĵoj, vizitkartoj, moneroj, kalendaroj, diversspecaj propagandiloj, manu-

brusto apud la antifasistaj distingoj ekbrilis ankaŭ oraj insignoj, medaloj kaj ordenoj pro laborsukcesoj.

Por ni, esperantistoj, estas aparte interesa la verda vojo de L. Grozdanov. Kun Esperanto li konatiĝis en 1932 kaj konigis al li tiun lingvon ne iu ain, sed la fama revoluciulo kaj esperantisto Nikola Šopov, pereinta poste en la fajro de la antifasista batalo.

Post la popola venko, refreŝiginte siajn lingvokojnojn, Grozdanov eklaboris tre aktive en la vicoj de Bulgara Esperantista Asocio. En 1963 li fondis la unuan en nia lando uzinan E-societon, kiu ricevis la nomon „48-a Universala Kongreso de Esperanto“ (en uzino „Kl. Vorosilov“ — Sofio). Prezidanto de la societo fariĝis Grozdanov. Li diplomigis kiel lektoro de Esperanto kaj ekgvidis ĉiujare po 1—2, eĉ po 3 kursojn kaj tiel ĝis hodiaŭ. Kiam en 1982 la grandega Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ esamenis, en la tria subdistrikto estis fondita E-societo „Nikola Šopov“, unu el la plej aktivaj en la ĉefurbo. Ĝia unua kaj ĝisnuna prezidanto estas L. Grozdanov.

Multon oni povas lerni de la esperantisto Grozdanov. Se vi vizitis lian hejmon, vi estus surprizita de lia riĉa E-biblioteko. Ankoraŭ pli surprizita vi estos, kiam vi aŭdos la sonoran E-parolon en la buŝoj de ĉiuj liaj familianoj — edzino kaj du filinoj. Admirinda estas Grozdanov ankaŭ pro lia riĉega korespondado — kun ĉ. 40 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Ĉio ĉi estas bonega kaj imitinda ekzemplo por ĉiu esperantisto. Ĉiu povas lerni de li kiel labori per Esperanto por la patrujo, por la amikeco inter la popoloj, por la paco sur la tero. Kaj ankoraŭ: kiel labori por Esperanto persiste, abnegacie, kun neniam velanta amo kaj energio.

Kunĉo VĀLEV

SATANTO DE LA NATURO KAJ RACIIGANTO

Eĉ vintre, se vi enirus la laborĉambron de ing. Radi Danev en la Entrepeno por prilaborado de aluminio „St. Stamenov“ — Sumen, vi ekhavis la impreson, ke vi estas en varma kaj sunplena Afriko. Ĉiam verdaj subtropikaj plantoj kreas freŝecon kaj intiman etoson. Tiel estas ankaŭ en lia hejmo. Altiras la atenton la olivarbo, la daktilo, laŭro k. a. Tamen plej bela kaj impresa estas la jam 6-jara kafoarbeto. Ĝiaj semoj estas transportitaj el malproksima Angolo kaj ekĝermis ĉi tie. Ĝia alteco nun estas pli ol 1,5 metrojn kaj ĝia krono havas diametron de unu metro. Ĝi jam havas pli ol 50 fruktojn.

Sed ing. Danev estas ne nur ŝatanto de la ekzotika naturo. Li estas ankaŭ aktiva numismato kaj jam de sia junaĝo, konvinkita kaj fervora esperantisto. Kiel studento en la Supera Teknika Lernejo „A. Kanchev“ en Ruse, dum la 60-aj jaroj, li estigas arda adepto de Esperanto. Tiutempe li lernas Esperanton kune kun Jordan Kazakov, kiu pli poste estas prezidanto de la Internacia Studenta E-ligo, kaj kun aliaj gestudentoj. Aktive partoprenas la agadon de tiu unua studenta Esperanto-unuiĝo. Nun li membras en la loka uzina E-societo „Metalurgo“ kaj per sia aŭtoritato ege helpas por ĝia sukcesa agado.

Ing. Danev ŝatas la teknikon. Dank' al sia fervoro li estas elektita prezidanto de la Uzina Konsilio de Teknika Evoluo. Li estas aŭtoro de kvar inventaĵoj kaj de kelkaj raciigoj. Pro liaj meritoj kiel sociiganto kaj raciiganto li estas distingita per la Arĝenta Honorinsigno de la Scienc-Teknikaj Societoj en nia lando kaj per la insigno „Elstara aganto de la metalurgio“. Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto ing. Radi Danev estas distingita ankaŭ per la Arĝenta Insigno de BEA.

Cvjatko TODOROV

skriptoj, ktp. ktp. La muzeo interŝanĝas esperantajojn kaj kunlaboradas kun similaj muzeoj kaj privataj kolektoj, senĉese riĉigas sian trezorejon. Kaj ĉion ĉi efektivas nur gesinoroj Yzal dank' al sia persista, inspirita kaj sindona laboro! Du ardaĵoj apostoloj de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj elspezis sian tutan havaron por konservi por la venontaj generacioj la riĉaĵojn kaj la ferojn de la monda esperantistaro! . .

Kun bondeziroj pri novaj renkontigoj kaj kun iom da tristo ni adiaŭis la gastamajn geedzojn Yzal. De nia mallonga, sed impresa restado en la Muzeo de Esperanto restis al ni sento de profunda estimo kaj simpatio kaj kara memorfoto. . .

ADIAŬ, HISPANIO!
ADIAŬ, KARAJ AMIKOJ! . .

Antaŭ nia vagono sur stacidomo Barcelono-Sants estis ĉiuj niaj novaj geamikoj: Magda kaj Jozefo Miranda, Andres Falkon Ferriol kaj Filip kaj ankoraŭ kelkaj esperantistoj, venintaj por adiaŭi nin. Ni volis diri multon, danki ilian afablecon kaj gastamon, sed vortoj estis nenecesaj: la okuloj kaj la koroj diris ĉion neelparolitan! En



La fondinto kaj prizorganto de Hispana Esperanto-Muzeo s-ro Luis Hernandez Yzal en sia laborĉambro.

niaj pensoj ni ankoraŭfoje dankis al niaj geamikoj el Madrido, Segovio, Toledo, Gandio. . . pro iliaj sinceraj sentoj, pro ĉio, kion ili faris, por ke nia restado en Hispanio estu agrabla kaj utila.

Adiaŭ, Hispanio! Adiaŭ, karaj amikoj! . .

(Fino)

Donĉo HITROV

Brila poeto de Bulgario

Pasis 110 jaroj de la morto de P. K. Javorov, unu el la plej talentaj kaj signifaj bulgaraj poetoj. Liaj versaĵoj estas belegaj, perfektaj laŭ la formo, forte impresaj: kant-similaj verstorentoj brile elverŝiĝas sub lia plumo, kvaŭ fajreroj ĉe bato de martelo sur la amboso. La polifonio de rimoj kaj ritmoj en lia simfonie sonanta poezio estas senrivala en la bulgara literaturo. Mirinda estas ankaŭ ĝia strofa riĉeco, ege plifortiganta la muzikan-emocian efektan.

Kiel poeto Javorov estis dotita per forta kapablo vidi kaj kompreni la vivkonfliktojn kaj -dramojn. En la periodo 1892—1898 li estis tre proksima al la socialisma movado en Bulgario. En liaj versaĵoj de tiuj jaroj speguliĝis la tragedio de la bulgaraj vi-

laĝanoj („Sur la kampo“, „Hajlo“). Post la frakaso de la Ilinden-ribeło (1903), en kies preparo Javorov partoprenis, en lia poezio aperis pesimis-



maj motivoj. Konsiderinda parto de tiuj versaĵoj estas alta tragedia liriko, en kiu sonas malĝojo pro la nerealiĝintaj idealoj, peza sento de seneliro, animdoloro en la sufoka atmosfero de la burĝa socio. Per vasta socia problemaro distingigas la dramoj de Javorov „En la piedo de Vitoŝa“ (1911) kaj „Kiel post la tondro la eĥo silentiĝas“ (1912).

Post la Ilinden-ribeło, kiam pereis multaj esperoj pri popola libero kaj pli hela estonto, la denaska inklino de Javorov al tragedia percepto de la mondo ege pliprofundigis. La plena de kontraŭdiroj realaĵo, kiun li persiste kaj atente observis, ŝajnis al li terura en sia „sencela“ senfino, kaj lia propra vojo — same. La poeto akre sentis la efemeran karakteron de la beleco, tial

OKULOJ VIAJ BELAJ

Okuloj viaj belaj! Animo de infan'
en du okuloj belaj. Muziko, steloj. . .
Ne volas, nek promesas ili. . .

Animo mia preĝas,

infano,

animo mia preĝas!

Pasioj kaj suferoj

sur ilin ĵetos morgaŭ kun rigor'

vualon de la peko kaj malglor'.

Vualon de la peko kaj malglor'

ne ĵetos morgaŭ kun rigor'

pasioj kaj suferoj.

Animo mia preĝas,

infano,

animo mia preĝas. . .

Ne volas, nek promesas ili! —

Okuloj viaj belaj! Muziko, steloj
en du okuloj belaj. Animo de infano.

EN BLANKAJ VESTOJ ESTOS VI

En blankaj vestoj estos vi — kiel anĝelo,
kaj kun branceto olivarba. . . Nia mond' —
mi pensas nun — ne estas putra pro malbon',
se estas ĝi patruj' de via belo!
Kaj jen ekdubis pli kaj pli mi fine
pri nekredemo mia — pacon volas mi.

Mi ĉirkaŭprenos vin kun kredo mia tuta,
okulojn viajn rigardante en silent',
kaj trinkos tiam, trinkos mi kun ama sent'
Iliajn lumradiojn — per kuracaj glutoj,
Kaj mi revidos tuj post la animheliĝ'
la mondon jam serena ĉe la sunleviĝ'.

Kaj se ĉi tiu mondo dronas en ruinoj
(Jam en ruinoj stumblis mi ĝis nun,
vagante ofte tute sola en mallum'!),
eĉ tiam derompajojn trovos mi finfine
por krei novan mondon por ni ambaŭ jam —
kaj mondon, kaj sanktejon nur de nia am'.

SOPIRO

Ho ĉi sopir' ĉiama de l' anim',
ho ĉi vagado al la malproksim',
sen vidi de la voj' la finon.

Kaj ĉi rigardo direktita kun impet'
al la morgaŭa tago, sed
sen scii ĉu haveno estas tie. . .

Tradukis: Venelin MITEV

ni recenzas

„Homo“ de Eduardas Mieželaitis, traduko de Petras Čeljauskas, Vilno. Eldonejo „Vaga“, 1986, 96 paĝoj formato 20×12. Eldonkvanto: 6000 ekzempleroj. Prezo: 60 kopekoj.

li trankvile akceptis la penson pri la „morto en junaĝo“, pri la mallongdaŭro de la vivo. Tiu spirite forta homo, kiu ne timis la propran morton, sentis „filozofian timon“ antaŭ la ĉiopovo de la morto ĝenerale. Per sia prudento li komprenis ĝian neceson — ja sen la morto ne eblas ankaŭ la vivo, — sed tiuj motivoj de la prudento ne donis pacon kaj lumon al lia animo.

Javorov ne nur profunde perceptis la eternecon, li ankaŭ havis la kuraĝon „rigardi“ al la „nebulaj torentoj da steloj“, al la „haoso senfina“. Kaj tio ja estas malfacila kaj danĝera eĉ por la spirite plej fortaj.

La naturo estis malavara al Javorov — ĝi dotis lin ankaŭ per alia terura kapablo — per civitana konscienco, kies akraj pikoĵoj lasis sangajn postsignojn en multaj liaj verkoj. Neniu alia bulgara poeto tiel ofte kaj tiel kruele kulpigis sin mem, kiel tion faris Javorov. Tio estas plia atestilo pri lia honesteco de civitano kaj poeto, plia fonto de liaj spiritalaj dramoj.

Eble Javorov povus reveni al la vivo kaj al sia verkado post la peza familia dramo — kvankam blinda post la malsukcesa provo pri memmortigo. Sed la kruele maljusteco de liaj juĝistoj kaj de la tiama burĝa socio igis lin garanti al si la morton samtempe per veneno kaj revolvo. . .

La kulpuloj por lia frua pereado ne amis lin — pro lia partopreno en la Ilinden-ribeło, pro lia frua soci-ribela poezio kaj ankaŭ pro la verkoj de lia „dua periodo“. Per sia verkaro kaj per la propra vivekzemplo li bruligis antaŭ iliaj okuloj mem la „sanktajn normojn“ de la burĝa socio. Sed ili eĉ ne povis imagi lian postmortan triumfon. „Mi estos vial Mi ĵuras, ho patrujo!“ — skribis Javorov. Kaj tiu lia ĵuro antaŭ la patrolando estas jam delonge realigita. Li apartenas al Bulgario kaj al la homaro.

Lidia RAEVA

Dum la estona literaturo estas bone prezentita en Esperanta traduko, la literaturo de alia ĉeĥaltmara lando — Litovio, estas tre malmulte prezentita. Pro tio la apero en Esperanta traduko de la poemaro „Homo“ de Eduardas Mieželaitis (pr. Eduardas Mejelajitis) en 1986 estas grava evento.

La aŭtoro de la poemaro E. Mieželaitis estas popola poeto de la Litova Soveta Socialisma Respubliko, Heroo de Socialisma Laboro, laŭreato de Lenin-premio. Li aktivis en multaj ĝenroj de la poezio. Estas popularaj ankaŭ liaj porinfanaj verkoj. Lia poezio ricevis ĝeneralan rekonon. La poeto estis dufoje premiita per respublika premio. Pro liaj versaĵoj pri Hindio li ricevis premion de G. Neru. Krome li estis la unua soveta verkisto, al kiu estis aljuĝita la internacia literaturo premio „Nikola Vapcarov“.

E. Mieželaitis naskiĝis en 1919, en laborista familio. En 1939 li finis gimnazion en Kaunas kaj poste studis juron. Dum la Granda Patrolanda Milito li estis militkorespondanto, post la milito laboris kiel redaktoro, poste estis sekretario de la Litova Verkista Unuiĝo kaj vicprezidanto de la Supera Soveto de la Litova SSR. Jam dum la Dua Mondmilito aperis lia unua verskolekto „Liriko“ (1943), poste sekvis la verskolektoj „Vento de naskiĝlando“ (1946). „La leviganta tero“ (1951), „Mi plektas buntan kantrubandon“ (1952), „Frata poem“ (1954), „Mia najtingalo“ (1956) k. a. En la plimulto de liaj libroj interplektigas esea publicistiko, ĵurnalista raporto, gazetaĵ rimarkoj, paĝoj de taglibro, cikloj de lirikaĵ versaĵoj. Tiaj estas la verkoj, eldonitaj dum la jaroj 1974-1981: „Aleliumoj“, „Aviaskizoj“, „Kontrapunktoj“, „Pantomimo“, „Tekstoj“, „Ĉi tie estas Litovio“, „Fabelo“, „Monologoj“. La plej novaj libroj de E. Mieželaitis estas „Muza kaj trutoj“ (1984), „Postskriptumoj“ (1986).

La verskolekto „Homo“ aperis en originalo en 1961 kaj ĝi estis eldonita tri fojojn. Por ĝi la aŭtoro estas premiita en 1962 per Lenin-premio. Ĝi konsistas el 31 poemoj, unu el kiuj estas titolita „Homo“. Ĉiuj poemoj estas penetritaj de profunda humanismo, estimo kaj amo al la homo. La tuta verskolekto estas himno pri la homo kaj pri lia patrino — la Tero. La poeto alvokas pri gardado de la simplaj valoroj, sur kiuj staras la mondo. En la libro alproksimiĝas la mondo de la naturo kaj la mondo, kreata de la volo kaj la racio de la homo, kreanto de ĉiuj valoroj sur la tero; en ĝi estas esprimita la ideo pri unueco kaj interligiteco de la mondo. Tiu ĉi la vivon konfirmanta libro samtempe estas penetrita de maltrankvilo pri la estonto de la homaro. Kiel en la aliaj libroj de E. Mieželaitis, ankaŭ en „Homo“ manifestiĝas la emo de la poeto al filozofia meditado. En la libro troviĝas interesaj pensoj kaj sentencoj. Jen unu strofo kun penso, kiun devas bone memori tiuj, kiuj deziras venki la mondon per detruo:

„Mi preteriris kaj komprenis, kiu venkos mondon —
Ne tiu, kiu volas venki per detrua ag’.

Sed kiu agas kiel sun’ donanta vivo-fonton. . .

Li venkos! Kaj laboro estos sun’!

Kaj alrapidu tia tag’!

(El la poemo „Ne tiu venkas, kiu volas venki per detruo“)

La libron „Homo“ la aŭtoro mem taksas kiel programan verkon sur sia vojo de kreaĵ serĉadoj. La libro ricevis rekonon en la monda literaturo; ĝi estas tradukita en multajn lingvojn.

La esperanta traduko estas farita de Petras Čeljauskas (prononcu Pjatrás Čeljaŭskas). La tradukinto atingis altan gradon de perfekteco en la traduko ĉiurilate: preskaŭ ĉiuj rimoj estas perfektaj, tre maloftaj estas la adasimoj, la ritmo estas observita ĉie, la vortordo estas natura. Pro tiuj ĉi kvalitoj de la traduko la poemaj sonas kiel en originalo. Tre malmultaj estas la neologismoj — nur tri: „frida“, „olda“ kaj „lanta“. Ili tamen estas iom konataj al la legantoj kaj troviĝas en RIV.

La libro entenas dupaĝajn klarigojn pri la propraj nomoj uzitaj en la versoj kun ties prononca varianto, kaj mallongajn notojn pri la vivo kaj verkaro de la poeto. La eldonaĵo estas ornamita per la belaj ilustraĵoj de la popola artisto de Litova SSR Stasys Krasauikas (1929—1977).

La libro estas presita sur luksa papero kaj lukse bindita. Preseraroj tute mankas.

Ni atendas novajn tradukojn en Esperanton de verkoj de la litova literaturo!

Dimităr HAGIEV

PRI LA ESPERANTO-FAKO EN LA BUDAPEŝTA UNIVERSITATO

Jam multaj scias, ke la 21-an de aŭgusto 1987 pro grava malsano mortis prof. d-ro István Szerdahelyi, universitata docento, gvidanto de la Esperanto-fako ĉe la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis la fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondo per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.

Post lia morto la sorto de la fako estis duba, sed per lastmomenta decido la instrua kaj scienca laboro pluiris eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn okupas du eksstudentinoj, liaj kunlaborantinoj: Ilona Koutny kaj d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits.

La fako estas unika per tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel la aliaj fakoj de la universitato kaj proponas kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. Krom la lingvoinstruado, la studoj inkluzivas priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, ĉe kiu ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.

Nuntempe krom la 13 regulaj studentoj ankaŭ 13 korespondaj studentoj partoprenas la 3-jaran studprogramon. La posedo de universitata diplomo kaj la scio de Esperanto estas antaŭkondiĉoj.

La memstara laboro de studentoj okazas en scienca studenta rondo — temas ĉefe pri pedagogio kaj lingvistiko, kaj ekde nun sub la gvido de Ilona Koutny ankaŭ pri komputilaj aplikoj (ekz. uzo de sintezita parolo en instruado, problemoj de maŝina tradukado). Aperadas studenta revuo „Opus Nigrum“, redaktata de István Ertl (ankaŭ redaktoro de IPR).

Eksterlandaj studentoj estas bonvenaj en la fako laŭ la kondiĉoj de la Universitato: 1. Studentoj, kiuj venas laŭ interŝtataj kontraktoj kaj ricevas stipendion, povas alpreni esperantologion kiel suplementan fakon; 2. Hungaroj, loĝantaj en la najbaraj landoj rajtas studi senpage, sed devas prizorgi sin mem; 3. Ĉiuj aliaj eksterlandanoj devas pagi por la studado.

La studadon povas kompletigi la vigla esperantista vivo en Budapeŝto (kulturaj kaj sciencaj aranĝoj), eldonaĵoj kaj riĉa librokolekto.

Por pluaj informoj bonvolu sin turni al Esperanto-fako, ELTE, Budapest, P.f. 107. H-1363, Hungario.

Repliko

POR VASTEGA PORESPERANTA INFORMADO

Traleĝante la Esperanto-periodaĵojn, mi ĉiam konstatas, ke la propagandvortoj atingas nur la legantaron, kiu kompreneble estas esperantistaro. Do, tiuj estas homoj jam konvinkitaj pri la utileco de Esperanto.

Aliflanke, ofte mi — kaj ne nur mi konstatas, ke multe da homoj scias nenion pri Esperanto, aŭ scias tro malmulte, tiom malmulte, ke per tio ili neniam fariĝos esperantistoj, eĉ amikoj de Esperanto.

Evidente estas necesa nova maniero de agado, kiu alproksimigos la ideon pri internacia lingvo ĝenerale, kaj pri Esperanto aparte, al la vastaj socitavoloj: laboristoj, kamparanoj, oficistoj, gejunuloj, ktp.

Kaj tio devas esti nia konstanta, ne kampanja tasko.

Tiu tasko ne estos plenumita per la nuntempe eldonataj Esperantaj periodaĵoj, kiuj estas destinitaj al jam konvinkitaj esperantistoj.

Miaopinie, paralele kun tiuj eldonaĵoj estas necesaj aliaj — en sufiĉe granda eldonkvanto, direktitaj al la vasta publiko neesperantista.

Tiaj eldonaĵoj povas esti Esperanto-ŝlosiloj, turismaj gvidiloj en Esperanto, k. a. kiuj, disvastigataj pere de RP-reto (Entrepreno por Disvastigo kaj Ekspedado de Presaĵoj) kaj la librovendeja sistemo en nia lando, atingos tiamaniere ĉiujn interesiĝintojn. Ili povos vidi sur la vitrinaj kaj librobretoj tiujn interesajn eldonaĵojn, kiuj instigus ilin al lernado de Esperanto. Tion urĝe bezonas nia movado, kiu nun aktivas en preskaŭ ferma rondo.

Nun la monda Esperanto-movado havas sufiĉe gravajn atingaĵojn kaj ni devas vaste popularigi ilin.

La bulteno „Informado pri Esperanto“, eldonata bulgarlingve de BEA, devas plibonigi sian grafikan arangon kaj sian enhavon per interesaj informoj kaj materialoj, devas fariĝi vera interligilo inter esperantistoj kaj neesperantistoj.

Kial do ni disvastigas Esperantajn librojn kaj lernolibrojn, revuojn k. s. nur inter niaj medioj, pere de la societoj? Kial do ni ne povus trovi ĉi tiujn eldonaĵojn ĉiuloj, kie oni vendas librojn kaj revuojn?

Starigi regulajn senperajn kontaktojn kun neesperantistaj medioj estas tasko, kiun ni devas realigi per vasteaga poresperanta informado.

Aristo TONEV



JUBILEA FESTO

La esperantista societo „Progreso“ en Ĥarmanli jam farigis 80-jara. Fine de novembro pasintjare estis organizita jubilea solenaĵo kun partopreno de multaj gastoj — reprezentantoj de soci-politikaj kaj kulturaj organizaĵoj en la urbo, de esperantistaj societoj el Ĥaskovo, Dimitrovgrad, Plovdiv kaj el aliaj najbaraj loĝlokoj. En sia parolado Dimitar Stoilov koncize rakontis la historion de societo „Progreso“ dum ĝia 80-jara ekzistado.

Multaj aktivuloj de la societo-jubileulo estis distingitaj per insignoj kaj jubileaj medaloj de BEA, per la honora titolo „Veterano de la bulgara E-movado“.

En la nomo de la Centra Estraro de BEA feste salutparolis Jordan Angelov, kiu substrekis la aktivan agadon kaj la meritojn de la membroj de „Progreso“ por la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto en la regiono de Ĥarmanli.

La solenaĵo finiĝis per varia arta kaj muzika programo, plenumita de junaj esperantistoj.

Todorka JANKOVA

NOVA BRAJLA E-ELDONAĴO EN BULGARIO

Laŭ la plano de la Sekcio de Nevidantaj Esperantistoj pri la 100-jara jubileo de Esperanto fine de 1987 la Asocio de Blinduloj en Bulgario (ABB) eldonis brajle ege utilan E-helpilon por nevidantaj esperantistoj — la libron „La tuta Esperanto“ de H. Seppik — tri bone aranĝitaj volumoj kun verda kovrilo entute 328 paĝoj.

La libro estas eldonita en 60 ekzempleroj. La prezo de unu volumo estas 1 levo. Presejo povas eldoni pli da ekzempleroj, se estas dezirantoj.

Vladimir JELEV

PADO DE LA SANO „ESPERANTO“

La iniciatemaj turistoj-esperantistoj el urbo Bankja proponas al vi pitoreskan kaj agrablan itineron tra Ljulin-montaro — la pado de la sano „Esperanto“. Ĝi komenciĝas de la lasta aŭtobushaltejo en vilaĝo Miĥajlovo, iras laŭ rivereto, inter du montoj, trapasas junan fag- kaj kverkarbaron. Post kvardekminuta trankvila marŝado, oni atingas la fontoŝtonon „100 jarojn Esperanto“.

Tiun ĉi fonton la turistoj-esperantistoj el Bankja konstruis post longa obstina laboro. En daŭro de kelkaj monatoj dum ekskursoj ili amasigis ŝtonojn, transportadis diversajn konstrumaterialojn, kunigante la utilan kun la agrabla. Multaj geesperantistoj el Sofio helpis ilin. La 22-an de novembro 1987 la fontoŝtono „100 jarojn Esperanto“ estis solene inaŭgurita.

Ripozante sur la benkoj apud la fontoŝtono, oni trinkis la bongustan akvon kaj poste promenis ĝis la Roka Panoramo. Ĝi troviĝas 1050 m super la marnivelo. De tie oni ĝuas neforgeseble belan vidaĵon. Poste oni descendas en vilaĝo Gradoman. La ekskurso daŭras

ĉirkaŭ tri horojn. Laŭ aserto de specialistoj, la aero en tiu ĉi regiono (Bankja kaj Ljulin-montaro), estas la plej freŝa kaj la plej riĉa je oksigeno en Bulgario.

Plej verŝajne la pureco de la aero estas kaŭzata de la fagaj arbaroj en la montaro, kiuj estas la plej grandaj naturaj uzinoj de oksigeno.

Unu nova pado de la sano, tute proksime al nia ĉefurbo, invitas la naturamikojn ĝui ĝiajn belecon kaj vidindaĵojn.

**D-ro Trifon MILEV,
Bankja**

SATATA CENTRO DE E-AGADO

Por la efektivigo de la komenciĝinta proceso de renovigado de la ekonomia kaj soci-politika vivo en nia lando, gravan rolon havas la Patrolanda Fronto (PF), kies kolektiva membro estas BEA. Nun la agado de la Patrolanda Fronto pli kaj pli direktiĝas al la intereso de la loĝantaro, strebas fariĝi pli alloga por ĉiuj.

Antaŭ unu jaro la ŝumenaj esperantistoj — membroj de la jam 83-jara societo „Vekiĝo“ kaj la komitato de PF en la ŝumena kvartalo „Enjo Markovski“, faris la unuajn komunajn paŝojn tiudirekte. Ĝis tiam la esperantistoj uzis la klubejojn de la kvartala organizaĵo por siaj kunvenoj kaj kursoj, sed la kontaktoj inter la du estraroj estis oficialaj. La unua, kiu rompis tiun baron, estis Jordanka Martinova — prezidantino de la kvartala organizaĵo de PF. Ŝi proponis al Cvjatko Stojanov — prezidanto de „Vekiĝo“, organizi komunajn kunsidojn. Ĉeestis ankaŭ Liljana Minceva — sekretario de la komunuma komitato de PF. Tiam oni prenis decidon por kreo de la unuaj kluboj laŭ intereso en tiu granda, centra kvartalo de Ŝumen. La vojo al kunagado kaj disvolvigo estis malfermita por la kluboj de filatelistoj, por la ŝatantoj de patrolanda historio, por la junaj folkloristoj k. a. Al tiuj kluboj kiel plenrajta membro aliĝis ankaŭ „Vekiĝo“.

Nun sur la frunta muro de la klubejo, troviĝanta sur str. „Al. Konstantinov“ — unu el la ĉefaj stratoj en la urbo, vice kun la kvartala firmao estas ankaŭ arte pentrita firmao de societo „Vekiĝo“. En la klubejo estas E-angulo, kie troviĝas la societa biblioteka ŝranko, la distingoj, per kiuj estas honoritaj la ŝumenaj esperantistoj por ilia multjara populatila kaj porpaca agado. Ĝi tie estas ankaŭ portreto de d-ro Zamenhof. Sur granda bela tabulo estas skribitaj la celoj kaj taskoj de la novekreitaj kluboj laŭ intereso, inkluzive tiun de la esperantistoj. Sur la vitra klubeja muro oni regule elmontras tabulojn kun Esperanto-materialoj el la vigla korespondado de „Vekiĝo“-anoj kun iliaj geamikoj el la tuta mondo. Ĉiun lundon tiu moderna klubejo transformiĝas en ŝatan centron por E-agado.

**Cvjatko TODOROV
Hristo TONEV**

LA INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO EN VELIKO TĀRNOVO

havos sian Sesan Sesion inter la 14-a kaj 22-a de julio ĉi-jare, kun prelegoj de elstaraj bulgaraj kaj eksterlandaj lektoroj.

ATENDU PLIAJN INFORMOJN!

La riĉenhava ilustrita revuo „Soveta Uzbekistano“ enkondukas ekde sia 4-a (aprila) numero de la kuran-
ta jaro Esperantan rubrikon: al la esperantistoj estos
disponigita duonpaĝo en ĉiu sekva numero. Se la le-
gantoj-esperantistoj estus pli aktivaj kunlaborantoj,
la spaco por Esperantaj materialoj en „Soveta Uzbek-
istano“ povas esti pligrandigita. En la rubriko aperas
en Esperanto aktualaj informoj pri la vivo en nun-
tempa Soveta Uzbekistano, pri antikva Uzbekio, lete-
roj de legantoj kaj respondoj al leteroj, literaturaĵoj.
En la 6-a (junia) numero de la revuo aperos la unua
leciono de Esperanto. Se oni montros intereson al tiu
rubriko, estos ebla aperado de E-lernolibro felieton-
maniere samtempe en 12 lingvoj (uzbeka, persa, araba,
rusa, hispana, angla, germana, k. a.). Do, petu de la
redakcio provekzempleron kun la Esperanta rubriko,
montru intereson al la vivo en Soveta Uzbekistano,
sendadu viajn leterojn en Esperanto aŭ en unu el la
supre menciitaj lingvoj kun demandoj kaj proponoj al
adreso: Revuo „SOVETSKIJ UZBEKISTAN“, Strato
Lenin 41 SU-700000 — Taŝkento, USSR

Uzbekaj esperantistoj kore salutas vin kaj atendas
viajn kontribuadojn.

KEK SERĈAS KONTAKTOJN KUN KOMUNISTOJ-ESPERANTISTOJ

- KEK eldonas: dumonatan organon „INTERNACIIS-
TO“. Redakcio, Franz Schick, Erstr. 11 A-8704
Leoben — Aŭstrio; abonkoto 2 levoj
- Libroservo de KEK: Luis Serrano Perez, Font
Nova 32; 08202 Sabadell — Hispanio
- Prezidanto de KEK — André Martin, 64, rue de
Coquelet B-5000 Namur, Belgio
- Viceprezidanto — Ljuben Grozdanov
- Gvidanto, respondeculo kaj peranto por USSR: Vla-
dimir Bespalov, poŝtkesto 913, 354000 Soĉi — USSR
Perantoj en 12 landoj
- Bulgaraj komunistoj-esperantistoj skribu al ni, pre-
cipe skribu aktivaj batalantoj. Por la venonta jaro
1989 ni planas konferencon de KEK en nia lando.
KOMUNISTA ESPERANTISTA KOLEKTIVO (KEK)
Bulgario P. K. 25, 1309 Sofio.

La 3-aj Turistaj E-Tagoj (TET), okazos en Sofio de
la 9-a ĝis la 12-a de junio 1988.

En la programo: vizito de muzeoj kaj vidindaĵoj,
promenadoj tra la urbo, ŝippromenado, projekciado
de E-filmoj, festo de la E-montodomo, konkursoj, eks-
pozicio k. a.

Pliajn informojn kaj aligilojn petu de la Organiza
Komitato, PK 45, BG-1090, Sofio, Bulgario.

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO

Ĵurnalo „Rabotničesko Delo“ (17. I. 1988) informis
pri plenkunsido de la Centra Estraro de BEA, kiu
akceptis novan organizan strukturon de la Asocio;
Pri la sama informis per ampleksa korespondaĵo de
Angel Andreevski j. „Oteĉestven Front“ (18. I. 1988);
la semajna sindikata gazeto „Transporten Glas“ (23.
XII. 1987) presis detalan informon kun foto pri la
ekspozicio „Esperanto en la filatelo kaj filokartio“
de fervojista esperantisto Georgi Litov.

EN LA LANDO:

Ĵurnalo „Novo Ludogorie“ — u. Razgrad (15. XII.
1987) sub rubriko „100 jarojn Esperanto“ aperigis gran-
dan informon de Georgi Haritonov pri naciskalaj Ta-
goj de Esperanta Kulturo en u. Razgrad; j. „Oteĉest-
ven Zov“ — u. Vraca (15. XII. 1987) aperigis artikolo-
n de Bojĉo Mladenov pri L. L. Zamenhof; la urba
gazeto „Dupniŝka Komuna“ — u. Stanke Dimitrov
(19. XII. 1987) sub rubriko „100 jarojn Esperanto“
aperigis trikolumnan artikolon de Stojan Kolarov pri
la Esperanto-movado en la urbo; la urba gazeto „Obo-
riŝte“ — u. Panagjuriŝte (19. XII. 1987) presis gran-
dan artikolon de Atanas Maĝirov pri Esperanto en la
urbo; la urba gazeto „Bankja“ — u. Bankja (14. XII.
1987) donis lokon al ampleksa raportaĵo de d-ro Trifon
Milev pri „Esperanta saniga pado“ sur montaro Ljulin,
konstruita de la lokaj esperantistoj.

Filatelo

La asocio „Komunikado“
emisiis la 15-an de februaro
1988 du poŝtmarkojn dediĉi-
tajn al la 110-jara datreveno
de la liberigo de Bulgario
elsub osmana jugo. La markoj
havas valoron de 5 kaj 13
stotinkoj. Formato —
28,5/39 mm.

Subjekto de la markoj es-
tas fragmentoj de grafikaj
kaj oleaj pentraĵoj el la
Milithistoria Muzeo en So-
fio. La projektojn de la mar-
koj faris la pentristo Simeon
Krăstev.

La novaj poŝtmarkoj es-
tas emisiitaj en 900 mil se-
rioj, laŭ la teknika metodo
de profunda kupra preso en
la entrepreno Bulgara Fila-
telo kaj Numismatiko.

Draguŝko PETROV

ПОЩА НР БЪЛГАРИЯ



ПО ГЛОТ ОСВОБОЖДЕНИЕТО
НА БЪЛГАРИЯ 1878-1988

5

ПОЩА НР БЪЛГАРИЯ



ПО ГЛОТ ОСВОБОЖДЕНИЕТО
НА БЪЛГАРИЯ 1878-1988

13



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

LAZAR TASEV (53-jara, fraŭlo) — 4700 — Smoljan, P. k. 99 — kun ĉi pri ĉi.

RADKA KOLEVA (pensulinjo) — Sofio, kv. Mladost I-A, bl. 504, vh. G et. II, ap. 64 — kun ĉi pri turismo, kuracmetodoj kaj muziko.

VLADIMIR JANKULOV (48-jara) — Krumovgrad 6900, r. Haskovo, ul. Al.Stambolijski 6, bl. Zdravec A-9 — kun ĉi pri abelbredado, paco.

IVANKA KANČEVA (45-jara) — 1233 Sofio, ĵ. k. Banišora, str. Korten bl. 36, vh. A, ap. 8, et. III — kun ĉi pri ĉi.

NADEJDA POPOVA (49-jara). 1517 Sofio, str. Moмина Klisura bl. 108, vh. A, ap. 9 — kun ĉi pri ĉi. 35 gekursanoj diversaĝaj dez. kor. kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: 9700 Ŝumen, str. P. Volov 12, Ĥristo Tonev.

HISPANIO

FERRIOL MASIP I BONET — Font Florida, 86 ler la E-08004 Barcelona, Katalunio/Hispanio — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉi.

JOSEP Ma TARRIDA I GALLART — Modesto Domingo, S/n E-08786 Vilanova D'Espoia, Katalunio/Hispanio — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉi.

ANNA Ma TARRIDA I GALLART — Modesto Domingo, s/n E-08786 Vilanova d'Espoia, Katalunio/Hispanio — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉi.

CARME DOMINGO I GUSTEMS — Modesto Domingo, s/n E-08786 Vilanova d'Espoia — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉi.

POLLANDO

JAN BOLESŁAW FABISIĄK, PL-98-100 Lask, ul. Polna 17 m. 3, kun ĉi pri ĉi kun geedzoj.

RAFAL FRACKOWIAK (22-jara). Korczaka 10, 64-000 Kościan — kun ĉi pri turismo, muziko, ĵurnalismo, sporto.

ANITA SZCZYGIELSKA (21-jara), ul. Bydgoska 23 B/6, 10-243 Olsztyn kun ĉi pri literaturo, sporto kaj lingvoj.

KRZYSZTOF DOBERSZTYN (23-jara, fraŭlo), 62-110 Damasławek, ul. Grunwaldzka 15 — kun ĉi pri vojaĝoj, filatelo, muziko kaj lingvoj.

SOVETUNIO

VLADIMIR DROBJAZKO (28-jara, fraŭlo) 252127, Kiev pro. 40-let Oktjabrja 122, kor. 2, kv. 28 — kun ĉi pri senalkoholaj koktejoj, konfitaĵoj. Kolektas BK.

NINA LUJEVA (44-jara) — SU-399740 Lipeckaja obl. u. Elec, str. Koroljova, 7, kv. 71 — kun ĉi pri ĉi.

JOLANTA ZIRGUTYTE (20-jara) — str. Partizany 162-42, u. Kaunas, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

DAURA KAZAKEVICIUTE (18-jara, fraŭlino), SU — Litovio 234430 Jurbarkas, Kranto 4-4 — kun ĉi pri literaturo, muziko, sporto. Kolektas PM, kalendaretojn, k. a.

ENHAVO

II. Faro kaj sorto de la laboruloj

- 1 Popola forumo
- 2 Zamenhof kaj Litovio (J. Petrulis)
- 4 En la Instituto por Kuracado de Fremdlandanoj (A. Grigorov, prof. K. Popov)
- 5 Granda amiko de la bulgaraj esperantistoj (N. Bogdanov)
- 6 Talenta Esperanto-poeto (Georgi Miĥalkov)
- 7 Zlatarski — naturesploranto (Evgeni Georgiev)
- 8 Intensa kurso de Esperanto en Kubo (Marin Băcev)
- 8 Sub hispana ĉielo (Dončo Hitrov)
- 10 Kuraĝa antifasiŝto kaj senlaca Esperanto-aganto (Kunčo Vălev)
- 12 Brila poeto de Bulgario (Lidia Raeva)
- 13 Ni recenzas: Poezio de profunda humanismo (Dimităr Haĝiev)
- 15 Enlanda movado

IV Distroj

INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto de la 20-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1988. Profitu samtempe trapasi agrablajn feriojn en montara ripoza loko, kadre de agrabla familia domo, proksime de Svislando (30 km sud-oriente de Genevo). Ĉi-jare la restado estos aparte interesa, ĉar ni kalkulas pri multe da alilandaj partoprenantoj por krei vere internacian etoson.

Vi trovos plurajn nivelojn de E-kursoj kaj ankaŭ piediradon en la montaro, ekskursojn belajn vesperkunvenojn kaj bonan manĝaĵon.

Restadkosto kun tri manĝoj: 111 FF tage. Ebleco tendumi proksime. Alĝo/Informo: ESPERANTO, 5 rue du Dr Roux, 34000 MONTPELLIER—FRANCE.

Cefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (viccefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĂCEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAGIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MIŤEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado.

Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distroj

ĈU ARBOJ ESTAS NUR ORNAMAĴO?

Arbo kun verda foliaro ne nur estas ĝuo por la okuloj. Se ĝi vivas cent jarojn, ĝi provizas homon por 20 jaroj per oksigeno. Ĝi estas: produktanto de oksigeno, vaporiganto, ombrodonacanto, ventosirmilo, polvokaptilo.

Dum cent jaroj unu sola arbo digestas kvanton da karbona dioksido, kiu estas entenata en 18 milionoj da kubaj metroj de natura aero.

— Ĝi fotokemie transformas 91 000 kilogramojn da bona dioksido kaj 37 700 litrojn da akvo.

— Ĝi deponas ĉirkaŭ 23 milionojn da kilogramkaloorioj (varmigkapablo de ĉirkaŭ 3500 kilogramoj da ŝtonkarbo).

— Ĝi disponigas por la spirado de homo kaj besto 6600 kilogramojn da oksigeno.

— Ĝi levas minimume 2500 tunojn da akvo — spite al gravito — el la radikoj en la arbokronon. Tiu akvo forvaporigas en la atmosferon kaj fiksas per tio varmeckvanton, kiu egalas al hejtvaloro de proksimume 25 000 kilogramoj da karbo.

— Sed ĝi faras ne nur tion. La arbo fiksas pli da polvo ol vitrotabulo, ŝmirita per graso. Ĝiaj ĉirkaŭ 200 000 folioj elvaporigas dum suna somertago ĝis 400 litrojn da akvo.

Do, arbo estas multe pli valora ol ĝia lignoprezo. Sen verdaj plantoj ni baldaŭ sufokigus.

Sed memoru: post 30 000-kilometra veturado de unusola aŭtomobilo, estas foruzita la centjara oksigenproduktado de arbo. . .

(El „La Migranto“)

Anekdotoj

— Kien vi iras Janis? — demandas la patro.
— En najbaran ĉambron.
— Kion vi faros tie?
— Mi helpos al Asnis.
— Kaj kion faras Asnis?
— Li ripozas.

— Panjo! En la lakton muso falis.
— Ĉu vi ĝin eligis?
— Ne, mi jetis tien la katon, por ke ĝi eligu la muson.

Al la malgranda Janis la avo donis pomon dirante:

— Dividu ĝin fratece por vi kaj via fratino.
— Kion signifas „fratece“? — demandis Janis.
— Tion, ke decas doni pli grandan parton al la fratino — klarigis la avo.

Janis pensadis kaj donis la pomon al sia fratineteto dirante:

— Fratineto mia! Dispartigu tiun ĉi pomon fratece! . .

Verkis: N. I. SIGAL-PODOLSKIJ;
Odeso, Sovetunio

Iu aŭtistino trapasas la straton ĉe ruĝa lumo. Alproksimiĝas milicano, haltigas ŝin kaj demandas: „Kia estas via profesio?“

— Mi estas instruistino — respondas la virino.

— Ho, bonege! — ekkrias la milicano. — De kiam mi atendis tiun momenton! Vi skribos centfoje: „Mi ne devas trapasi straton, kiam la lumo estas ruĝa!“ kaj morgaŭ vi alportos ĝin al mi.

Iu juna knabino diras al sia amikino:

— Mi estas tre kontenta, kiam mia patrino invitas gastojn por vespermango.

— Kial? — demandas la amikino.

— Ĉar ŝi priservas la mangajojn en la multekosta porcelana servico kaj poste ŝi malpermesas al mi lavi ĝin.

Dum lekcio iu profesoro diras:

— La prudentaj homoj ĉiam suspektas ĉion, nur la stultuloj estas absolute certaj.

— Ĉu vi estas absolute certa? — demandas iu studento.


— Jes, absolute certa! — respondas la profesoro.



Ŝekspiro



Kafka



Einstein



Chaplin